


人民中國報道

El Populo Cínico

Okt. 1952

10



La Ĉina Popola Respubliko

Fortikaĵo de Paco en Azia kaj Pacifika Regionoj

Kun tre granda ĝojo la ĉina popolo bonvenigas la 3-an datrevenon de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi havas duoblajn motivojn por jubili la ĉi-jaran Nacian Tagon, ĉar ĉi-jare ne nur Ĉinio sukcese trapasis la periodon de sia ekonomia revigligo kaj plenumis la preparajn laborojn por grandskala industria kaj agrikultura konstruado, sed ĝustatempe centoj da pacbatalantoj reprezentantaj pli ol 30 landojn okazigas en la popola ĉefurbo Pekino historie signifoplenan Packonferencon de Azia kaj Pacifika Regionoj.

En septembro de 1949, en la malferma parolado en la Unua Plena Kunsido de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo, kiu elektis la Komitaton de la Centra Popola Registaro, Prezidanto Maŭ Ze-tung deklaris: "De nun niaj nacioj apartenas al la granda familio de tutmondaj nacioj pac- kaj liber-amaj, kaj brave kaj diligente laborante kreas siajn proprajn civilizacion kaj feliĉon, kaj samtempe ankaŭ akcelas la pacon kaj liberecon de la tuta mondo." En la sama parolado Prezidanto Maŭ Ze-tung ankaŭ diris: "Malfaciloj ekzistas, kaj eĉ multaj ekzistas antaŭ ni, sed ni estas konvinkitaj, ke ĉiuj malfaciloj estos venkitaj de la brava batalado de la tutlanda popolo."

En la pasintaj tri jaroj, ĝuste laŭ la direkto indikita de ĝia granda kaj prudenta gvidanto, la ĉina popolo venkis ĉiujn malfacilojn internajn kaj de ekstere al ĝi altruditajn, fondis prosperan kaj feliĉan novan socion de popoldemokratio, kaj sekve de tio staras kiel firma fortikaĵo en la defendo de paco en Azio kaj la mondo.

Antaŭ tri jaroj, kiam la Ĉina Popola Respubliko proklamis sian fondiĝon, la lando kiun la ĉina popolo ricevis, estis tiel terure difektita de la rabado kaj trampilado de la japanaj kaj Usonaj agresintoj kaj Kuomintang-reakciularo, ke ĝi havis neniun fervojon facile trapaseblan kaj neniun riverdigon sendifektan, kaj ke en ĝi la inflacio detruis kiel diluvo la jam bankrotintan nacian ekonomion kaj milionoj da malsatantoj ĝemis pro malsato. La restanta forto de Kuomintang kaj la imperiistoj malvolonte elpelitaj de sur la ĉina kontinento, sendis grandamase da subfosantoj sin kaŝi en diversaj lokoj, institucioj kaj fabrikoj tra la lando, kiuj organizis kaj agitis bienulojn al ribelaj agadoj. Tia estis la situacio de Ĉinio tuj antaŭ sia liberiĝo.

Krom tio, malpli ol unu jaro post kiam la nova Ĉinio naskiĝis, la Usonaj fajroludantoj ekentreprenis barbaran agreson al la najbaro de Ĉinio — Korea Demokratia Popola Respubliko, invadis ĝis la landlimo de Ĉinio, kaj senskrupule ekokupis la ĉinan teritorion Tajvan kaj atakis la teritorian aeron de la nordorienta Ĉinio. Ili eĉ intencis surmare blokadi la novan Ĉinion kaj ĝin strangoli per altrudo de sennombraj malfaciloj por restarigi la reakcian regadon.

Tamen la ĉina popolo sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio "brave kaj diligente" venkis ĉiujn ĉi malfacilojn. En la tempo de pli ol du jaroj ĝi ripar-

is la damaĝojn de 12 jaroj. Samtempe dum la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj la brava Korea Popola Armeo kune rebatis la atakon de la imperiista armea forto estrata de Usono al la ĉina landlimo, la laboranta popolo de Ĉinio plenumis multe da grandaj taskoj de socia reformo kaj paca konstruado.

Ĝis nun, en la regionoj kun pli ol 400 milionoj da kamparanaj loĝantoj en Ĉinio jam efektiviĝis agrara reformo. Escepte la landlimajn regionojn de minoritatoj kaj la liberigota Tajvan, en la restantaj regionoj kun 30 milionoj da kamparanaj loĝantoj agrara reformo ankaŭ plenumiĝis en la ĉi-jara vintro. Per tio la feŭdalisimo fundamente malaperos sur la ĉina kontinento por eterne.


Same kiel la agrikulturo liberiĝis el sub la ekspluatado de feŭdaj bienuloj de miloj da jaroj, la ĉina industrio estas liberiĝinta el sub la regado de imperiismo kaj kompradora kapitalo kaj el ĝia servo al ili. La stato ŝanĝiĝis en tion ke en la industrio la ŝtataj entreprenoj de socialisma karaktero troviĝas en ĉefa kaj gvida pozicio. La ĉina laboristaro kiu fariĝis la mastro kaj gvidanto de la lando, ne nur faris preparojn por la grandskala industriigo de Ĉinio, sed ankaŭ laŭ speco kaj kvanto de la manufakturoj kontentigas la bezonojn de la kamparanaj amasoj kies aĉetpovo tagon post tago pli grandiĝas kaj kiuj rapide plivastigas la reproduktadon. Pere de la ŝtataj komercaj kaj kooperativaj organizoj, la rezulto de la tutlanda interŝanĝado de produktaĵoj inter urboj kaj vilaĝoj havigis al la komercaj grenoj kaj materialaj produktaĵoj de la tutlanda agrikulturo bonan merkaton. Aliflanke, la impostoj de la kamparanoj ankaŭ multe malpezigiĝis. Tiel, la laborista-kamparana alianco sub la gvido de la laborista klaso akiris pli fortikan bazon ekonomian.


Ne nur la enlanda komerco multe disvolviĝas, sed ankaŭ la ĉina komerco kun eksterlando rapide revigligiĝis kaj superis la plej altan nivelon antaŭ la milito pro la disvolviĝo de la produktado kaj la granda bezono de la ekonomia konstruado. Dum la pasintaj 73 jaroj Ĉinio la unuan fojon havas favoran bilancon de komerco. Ĉinio ne plu bezonas la importon de grenoj kaj kotono kaj sekve ŝparas grandkvanton da fremda moninterŝanĝo. Per la interŝanĝo de grandkvantaj agrikulturaj kaj specialaj lokaj produktaĵoj, kiuj povas provizi la bezonojn de aliaj landoj, estas importataj maŝinoj kaj industriaj materialoj. En la jaro 1951 la komerca kvanto inter Ĉinio kaj la socialisma kaj orient-eŭropaj popoldemokratiaj landoj estis duoblo de tiu inter Ĉinio kaj la kapitalismaj landoj. Tio sendependigis Ĉinion por ĉiam de la monda kapitalisma ekonomio.

La movado kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo en ĉiuj ŝtataj institucioj kaj ŝtataj entreprenoj, kiu komenciĝis en la fino de 1951 kaj finiĝis antaŭ nelonge, forlavis la malnov-sociajn malpurajojn postlasitajn de miloj da jaroj kaj alportis tute novan moron de senkorupteco kaj prirespondeco en laborado. En la sama periodo, la movado entreprenita



PREZIDANTO MAŮ ZE-TUNG





La ĝojaj lernantinoj kun packolomboj en la parado de la Nacia Festo.

kontraŭ subaĉeto, kontrabando kaj evito de impostpago, ŝtelo de ŝtataj propretoj, trompo ĉe ŝtataj kontraktoj de varmendo kaj konstruo, kaj ŝtelakirado de ŝtataj ekonomiaj informoj fare de la leĝrompantaj kapitalistoj, ankaŭ igis la privatajn industriistojn kaj komercistojn pli normale sin okupi en laŭleĝaj entreprenoj. Kvankam en la tutlandaj industrio kaj komerco la proporcio de ŝtataj entreprenoj jaron post jaro pligrandiĝas, tamen neniom reduktiĝas, sed male, plimultiĝas la entreprenoj de la nacia burĝaro. Ili diferencas nun de la pasinteco per tio, ke sub la gvido de la ŝtataj entreprenoj, konforme al la plano de landkonstruado ili sin okupas je entreprenoj utilaj al la nacia ekonomio kaj popola vivo.

Pro la altiĝo de la laborentuziasmo de la popolo kaj dank' al la helpo de Sovetiaj specialistoj, la popola registaro dum tre mallonga tempo plenumis la projektojn subjugi la inundan plagon ĉe Huaj-Rivero kaj la meza parto de Jangze-Rivero. Vagonaro jam komencis veturadi sur la Ĉengtu-Ĉunkina Fervojo — la unua fervojo konstruita tute per ĉina materialo. Ankaŭ la Tianŝuj-Lanĉoŭa Fervojo estas kompletigita.

La agrikultura kaj industria produktado de nova Ĉinio ne nur revigliĝas, sed en multaj fakoj superis la plej altan nivelon antaŭ la Milito kontraŭ Japanio. Tio fundamente rebonigis la nacian ekonomion kaj aperigis en Ĉinio historie senprecedencan ekvilibron de ŝtata budĝeto por 1952.

En tiu ĉi cirkonstanco, la materia kaj kultura vivo de la laboranta popolo de Ĉinio tagon post tago altniveligadas. En la jaro 1952, la efektiva salajro de la ĉinaj laboristoj plialtiĝis je 60%-120% ol en 1949 — la jaro kiam la tuta lando liberiĝis, ne enkalkulante la bonon kiun ili ricevas el la labora asekuro.

En aŭgusto ĉi-jare, la Centra Popola Registaro faris decidon, ke ĝi laŭpaŝe enlaborigos ĉiujn laborulojn de la lando garantianta laborakiron al ĉiu kiu labori povas. Ĝis la fino de la kuranta jaro, la analfabeteco inter la industria laboristaro estos forbalaita. En 1952 la sumo kiun la ŝtata budĝeto elspezas por disvolvi la kulturon kaj edukadon por la popolo, pli grandiĝis ol pasintjare je 184.83%.

Ĉiuj ĉi sukcesoj ne estas disigeblaj de la landskalaj sociaj reformoj dum la pasintaj tri jaroj, kiuj elradikigis la feŭdalisman ekspluatatan sistemon; anstataŭigis per naci-sendependa ekonomio la duonkolonian ekonomion de Ĉinio sub la regado de imperiismo; reguligis

la industriojn kaj komercon; ŝanĝis Ĉinion el nacia disiĝeco en intime unuiĝintan familiegon de multaj nacioj; kaj plifirmigis la unuiĝon de la kvar demokrataj klasoj de Ĉinio gvidataj de la laborista klaso surbaze de laborista-kamparana alianco.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ Ze-tung diris: "Ĉiuj faktoj pruvas: multe pli bona ol la reĝimo de kapitalismaj ŝtatoj estas nia reĝimo de popoldemokratia diktatoro, sur kies bazo nia popolo povas disvolvi sian senliman forton kiu estas nevenkebla de kia ajn malamiko."

Necesas mencii, ke tiuj ĉi brilaj sukcesoj estas gajnitaj en la sama tempo kiam la ĉina popolo per grandega homa

kaj materiala forto subtenas la justan militon kontraŭ la agreso de la armita forto de Usonaj imperiistoj en Koreio. Tio ankaŭ elokvente klarigas: kiam la 475-miliona popolo ekposedas la sorton en siaj propraj manoj, ĝi povas disvolvi sian nemezureblan kreaĵon, kaj nenia forto povas bari ĝian progreson. Ĝi kapablis renversi la regadon de imperiistoj kaj enlanda reakciularo, ĝi certe ankaŭ kapablas gardi la frukton de la triumfo. Ĝi kapablas konstrui sian landon, ĝi certe ankaŭ kapablas defendi la pacon necesegan al ĝia konstruado.

La ĉina popolo malamegas la krimagojn de la Usonaj imperiistoj rearmu Japanion kaj prokrasti la armisticon intertraktadon en Koreio, ĉar ĝi scias, se en ĝia najbareco kaj en aliaj lokoj de la mondo ne troviĝas minaco de milito, ĝi ne nur povas pli bone irigi la novdemokratian konstruadon, sed ankaŭ povas pli senobstakle fari ekonomian kaj kulturen interesanĝadon kun diverslandaj popoloj kaj akceli la prosperon kaj bonvivon de la homaro. Tio estas la kialo, ke la ĉina popolo tiel varme bonvenigas la centojn da pacdelegitoj el Azia kaj Pacifika regionoj. Sed samtempe, de sia propra sperto el la triumfa batalado dum la pasintaj pli ol du jaroj por helpi Koreion kontraŭ la agreso de Usono la ĉina popolo estas konvinkita, ke kiom ajn kruelaj estus la Usonaj imperiistoj, ili estas venkeblaj. Ĉar malebligi la intrigon de Usono pri plivastigo de militoj ne nur estas necese por la frua atingo al pli feliĉa socio de socialismo por la ĉina popolo, sed ankaŭ konformas al la aspiroj de ĉiu nacio pri sendependeco, paca ekzistado kaj amika kunlaborado kun aliaj landoj, tio estas ankaŭ fervore subtenata de la aliaj popoloj.

Ĉar la milita instigantoj de Usono ne volas fini la korean militon sur justa kaj racia bazo, sed tamen entreprenis malhoman bakterian militon; intensigas siajn agadojn por disvastigi militajn bazojn en Japanio kaj sur aliaj insuloj de Pacifiko; kaj plimultiĝas siajn intervenojn en la bataladon de koloniaj popoloj por sendependeco, ĝi jam senprecedence sin izoligis kaj igis la 1,600-milionajn popolojn de Azia kaj Pacifika regionoj, pli intime ligi siajn manojn kaj kune ekstaris en la flankon de la paca kaj demokratia tendaro gvidata de Sovetunio kaj ekagis por sinsavi el milita katastrofo kaj por la paca kunekzistado kaj amika kunlaborado de ĉiuj nacioj.

La juna Ĉina Popola Respubliko etendas siajn fortajn brakojn por ĉirkaŭbraki ĉiujn ĉi pacamikojn kaj kune kun ĉiuj popoloj daŭre defendos per sia nevenkebla forto nian komunan aferon — la Pacon.

Usona "Humanismo" Malkovrita

La Usonaj agresantoj daŭre provis trompi la mondon, dirante ke ili ne volas tuj haltigi la militon en Koreio pro "humanismaj" konsideroj por la interesoj de la militkaptitoj kiuj "rifuzis repatriacion (reenpatriigon)". Tiu ĉi malsaĝa mensogo, delonge bankrotinta, denove estis malkovrata de la Usonaj gazetoj.


La vera kaŭzo, kial la Usona registaro prokrastadas la armisticon intertraktadon en Koreio, estis elmontrata de Usona rubrikisto I. F. Stone en la *Daily Compass* je la 18a, julio. Li skribis: "La Korea milito jam fariĝis politika necesajo por Usona fremdlanda politiko." Li ankaŭ diris: "Se armistico realiĝus en Koreio, internacia streĉeco estos malstreĉita, reviviĝos esperoj por pli vasta solvo de problemoj kaj plimalfaciliĝos ol iam ajn teni la rapidecon de la okcident-eŭropa armado kaj antaŭenpuŝi la remilitarigon de Okcidenta Germanio."

La malrapidigo en la paŝo de remilitarigo, kiu rezultigis el armistico en Koreio, estus mortiga bato al la Usonaj monopolaj kapitalistoj, kiuj estas kolektantaj militprofitegon. Sylvia F. Porter, Usona rubrikistino, skribis en la *New York Post* je la 22a, julio, dirante, ke Korea armistico povus alporti al Usono "malpliigantan elspezon, malpliigantan laborokupon, malpliigantan produkton, malpliigantan profiton." Ŝi elmontris, ke Usona agreso hodiaŭ "estas ĉefa apogilo de nia hodiaŭa prospero." La giganta "defenda" elspezo, kion faris Usono por agreso, ebligis ĝin "salti de florado al florado." Armistico en Koreio signifus redukton en "defenda" elspezo, kaj redukto en "defenda" elspezo kondukus al ekonomia deprimiteco. Ŝi citis iun Usonan "tutnacie respektitan ekonomiiston," kiu diris: "En venontaj jaroj ni nepre estos alkondukataj al malflorado. Ni ne povos eviti. Redukto en

'defenda' elspezo nur alportos ĝin plifruue... Ni estus en deprimiteco ĝuste nun, se ne pro granda 'defenda' elspezo. Sed kiam la elspezo estus reduktita, ni estus falontaj, falontaj rapide."

Tiu ĉi estas la vera kaŭzo, kial la Usonaj agresantoj bezonas plilongigi kaj eĉ submini la Korean armisticon intertraktadon. Ili provis uzi milojn kaj dekmilojn da Usonaj, Britaj kaj Kanadaj junuloj por malhelpi siajn ekonomiajn radojn kuregi malsupren. Malpuraj Usonaj dolaroj en sango trempitaj estas la veraj simboloj de la tiel nomita "humanismo" de Usonaj agresantoj.

Trad. Nash



Terura sceno de n-ro 76 Militkaptitejo en Koje-Insulo, kie Usona armeo ĵus finis sian malhumanan buĉadon kontraŭ la kaptitoj sendefendaj kaj nun ankoraŭ dense fumas la incendiaj bomboj kaj larm-igaj bomboj.

Nova Pruvo de Ĉinia-Sovetia Amikeco

La amikeco kaj solidareco inter Sovetio kaj Ĉinio plurfoje manifestiĝis en la lasta traktado okazigita en Moskvo. En tiu ĉi traktado estas konfirmata ke la transdono de Ĉina-Ĉangĉun-a Fervojo inkluzive ĉiujn rajtojn kaj proprajojn rilatajn al tiu ĉi fervojo al Ĉina Popola Respubliko devas esti plenumita antaŭ la 31a de decembro en 1952. Kaj por tiu ĉi celo estas aprobita de ambaŭ flankoj la organizado de Ĉinia-Sovetia Komitato por prizorgi la transdonon. Krome, por efike garantii la pacon en Azio Sovetio konsentis la proponon de la Ĉina Popola Respubliko prokrastigi la retiron de Sovetiaj trupoj el la kune uzata ĉina marmilita bazo Port-Arturo difinitan en la artikolo II de la Ĉinia-Sovetia Kontrakto ĝis kiam la packontrakto inter la Ĉina Popola Respubliko kaj Japanio kaj tiu inter Sovetio kaj Japanio estos subskribita.

Cejlono Sin Turnas al la Oriento

La komerca trakto bazita sur egaleco kaj reciproka profit-dono inter la Ĉina Popola Respubliko kaj Cejlono

finiĝis kaj akiris rezultaton kontentigan al ambaŭ flankoj. Ĉinio konsentas vendi al Cejlono 80,000 tunojn da rizo kaj returne Cejlono vendos al Ĉinio je deca proporcia prezo kaŭĉukon. Kiel diris R. G. Senanajeke, ĉefo de la Delegacio, tiu ĉi trakto jam semis amikecon kaj prosperon inter Ĉinio kaj Cejlono. Por sia prospero, antaŭe Cejlono sin turnis al la Okcidento, sed de nun ĝi decidis sin turni al la Oriento.

Birma Delegacio Observis Agraran Reformon en Ĉinio

Birma Delegacio por Observi Agraran Reformon en Ĉinio venis al Ĉinio je la 2-a de septembro. Ĝi estas gvidata de Thakin Tin, Ministro de Agro-ŝtatigo de Birmo. En la daŭro de unu monato la Delegacio jam vizitis la vilaĝojn, ŝtatan farmon, akademion pri agrikultura scienco kaj fabrikon de agrikulturaj maŝinoj proksime al Pekino kaj ankaŭ la vilaĝojn en la Hopej-provinco kaj Norda Kiangsu, kie la agrara reformo estas jam finita. Poste ili iris al Ĉekiang-Provinco por viziti la kamparon tie.

Estingu la Militfajron kaj Savu la Pacon!

Paco! Paco! Tio estas la elkora voĉo de milionoj kaj dek milionoj da homoj, la postulo de tutmondaj popoloj kaj ankaŭ la kora sopiro de la popoloj en Azia kaj Pacifika regionoj.

Estas kompreneble ke la paco ne estas apartigebla, tamen pri la graveco de la paco la popoloj en Azia kaj Pacifika regionoj konas pli profunde ol tiuj en la aliaj regionoj de la mondo. Oni ne parolu pri la pli malproksima dolora historio en la lasta jarcento de la Aziaj popoloj, kiuj estis sklavigitaj kaj turmentitaj, sopiris al paco kaj trankvilo kaj ne povis tion akiri. Nur la ankoraŭ freŝimpresa ĵus pasinta militfajro, kiun bruligis la japanaj militaristoj, jam donis grandan doloron kaj profundan vundon! Ĝi involvis la pli grandan parton de Ĉinio, turmentis la Sudorientan Azion, ampleksis Sudmaran Insularon kaj ankaŭ sturme atakis Havenon Perlo. Ĝi kaŭzis al la popoloj ne kalkuleblan perdon kaj profunde stampis kruelan postsignon de milito sur la korojn de la popoloj de la landoj sur la Pacifikaj bordoj. Kaj finfine ankaŭ Japanio mem ricevis la pli kruelan kaj tragikan atakon per atombombo. Sed la provokantoj de la milito estis la kapitalistoj kaj militaristoj kaj la mortigitoj en Nagasaki kaj Hiroŝima estis tamen la 100,000 nearmitaj popolanoj inkluzive virinojn, maljunulojn kaj infanojn. Tial la motivo postuli la pacon de la popoloj de la Azia kaj Pacifika regionoj, ne devenas de utopia abstrakta ideo de la moralo, sed de la kora postulo naskita el la sperto de la terura milito. Kaj sekve ili estas pretaj por batali por la paco.

La impresoj pri la pasintaj okazintaĵoj restas ankoraŭ klare en la memoro, kaj Azio denove involviĝas en malpacan staton. Japanio estas denove remilitarigata. Tio rememorigas nin pri la katastrofa krimagado fare de la militarista Japanio antaŭ nelonge. La pacaj kamparanoj de Vietnamo estas masakritaj dum plugado, la pacaj laboristoj de Malajo estas murditaj dum gumeligado, la japana popolo nun estas premata kaj insultata kiel sklavoj, ĉie en la Azia kaj Pacifika regionoj prezentiĝas la sama maltrankvilo. Kaj pli kruela estas la situacio en Koreio: la infanoj en luliloj kaj la mamnutrantaj patrinoj fariĝis la objektoj de masakrado kaj kun senhomeco la bakteriaj armiloj estas uzataj. Antaŭ tio neniuj kun konscienco povas ne indigni kaj ĉiu homo povas kompreni ke se ni hodiaŭ ne kun ŝvito penas estingi la jam bruligitan militfajron en Azio kaj savi la pacon, en la venontaj tagoj la pacon ni povos akiri nur kun multobla sangado.

Estas nia espero ke ĉiu homo kulturu sian kampon, konstruu sian hejmon kaj fondu internacian amikecon kaj kunlaboron sur la bazo de interhelpo. Ni ne aprobas la intervenon de unu lando en la interna politiko de alia lando nek la restadon de trupoj de unu lando en alia lando. Se Japanio okupus Usonon kaj postulus de ĝi bazojn de aer- kaj mar-fortoj, ni tion nepre kontraŭstaras, sam motive ni ankaŭ kontraŭstaras la okupadon de Japanio kaj la postulon pri bazoj de aer- kaj mar-fortoj en Japanio fare de Usono. Se la Aziaj armeoj invadus Amerikon, ni tion absolute kontraŭstaras, sam motive ni ankaŭ kontraŭstaras la entrudiĝon de Usona armeo en Azion por sklavigi la

Aziajn popolojn. Ni kontraŭstaras la sklavigon de Vietnamo fare de Francio tiel same kiel ni tion kontraŭstaras, se Vietnamo sklavigus Francion. En Ĉinio estas antikva proverbo: "Kio al vi ne plaĉas, tion al la aliaj ne faru." Inter la nacioj devas esti ne la rilato de sklavigo kaj sklaviĝo, sed la rilato de reciproka respekto kaj paca kunvivado. Konkuro, kiu disvastiĝas inter la nacioj, devas esti konkuro al plibona vivo de sia popolo sed ne konkuro en buĉado kaj militpreparoj.

La militfajro en Azia kaj Pacifika regionoj jam estas bruligita de la militprovokantoj. Ĉiu homo kun konscienco havas la respondecon estingi la militfajron. La sorto de paco estas en danĝero, ni devas rapide kaj kuraĝe paŝi antaŭen por savi la pacon.

Elĉinigitaj Zekun

Paca Konferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj

La Paca Konferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj estas malfermita je la 2-a de oktobro en Pekino. Ĝis tiam sin anoncis jam 344 delegitoj el 37 landoj en Azio, Aŭstralio kaj landoj ĉirkaŭ la Pacifiko. En kelkaj landoj la reacia registaro multemaniere malhelpis la partoprenon de la pacaj delegitoj, ekzemple la japana kaj Aŭstralia registaroj ne donis al la delegitoj pasporton. Tamen la delegitoj konkerinte ĉiajn malhelpojn ĉeestis la konferencon. Ili reprezentas tre vastan popolamason. Inter ili troviĝas homoj el malsamaj sociaj tavoloj, kun malsamaj politikaj kredoj, malsamaj religiaj kredoj kaj malsamaj profesioj el ĉiuj landoj. Sed ili havas saman esperon, t.e. defendi la pacon. Nun ankoraŭ multaj pacaj delegitoj alvenadas al Pekino.

Amikeco inter Ĉina kaj Hindia Popoloj

Respondante la alvokon de Unio de Urĝohelpa Komitato en *Andhra*, Hindio, kie okazas terura malsato lastjare, kvin populaj organizoj (t.e. la Ĉina Ruĝakruca Asocio, la Ĉina Popola Urĝohelpa Asocio, la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj kaj la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj) en Ĉinio kolektis 2,000,000,000 juanojn (egale al 421,940 rupioj) kaj ĝin rimesis al Hinda Registaro por helpo al popolanoj en *Andhra* regiono.

Verkoj de Soong Ĉing-ling

Je la tria datreveno de la ĉina nacia festo eldoniĝis la libro "Batalo por la Nova Ĉinio", kolekto de la verkoj de Soong Ĉing-ling (s-rino Sun Jat-sen), vicprezidentino de la Ĉina Popola Respubliko. La libro konsistas el kvin partoj kaj 63 artikoloj. En ili troviĝas la ĉefaj verkoj, paroladoj kaj deklaroj en la jaroj 1927-1952, t.e. en la periodoj de la perfido de Ĉiang Kaj-ŝek, la faŝista regado de Kuomintang, la invado de Japanaj faŝistoj, la rezista milito kaj post la liberiĝo de tuta Ĉinio. Ĝi estas libro havanta historian signifon en la ĉina popola revolucio. La anglalingva eldono eldoniĝos ankaŭ baldaŭ.

Niaj Grenoj Kreskas Fortaj Ankaŭ sub la Bombardo

Pri kolhozo tuj apud la batalfronto en Koreio

Kung Ke-min

Diskoniĝis tra multaj vilaĝoj tuj apud la batalfronto la novaĵo ke ĉinaj popolaj volontuloj helpis korean kolhozon en sturma semado. En la Maja Tago, por gratuli ilian sukceson, la junaj pioniroj de la kolhozo speciale kolektis de sur montdeklivo diversajn florojn kaj aranĝis ilin en atentotirajn vortegojn sur la murgazeta tabulo antaŭ la pordo de la kolhoza oficejo: "Onkloj Volontuloj helpis nin en sturma semado per du mil laborunuoj (1 labora unuo = unutaga laboro de unu persono) kaj plenumis la semadon sur pli ol 400,000 pjung da senakvaj kampoj" (1 pjung = 0.037 aro). La gubernio ankaŭ donacis al la ĉinaj volontuloj silkan flagon por esprimi la amikecon.

Kiam mi iris viziti la kolhozon, aŭdiĝis senĉesa tondrado de kanonoj. La malamikoj jen kaj jen kanonas ĉi tien obusojn sencele kaj aeroplanoj ankaŭ supre zumas. Tamen la produkta entuziasmo de la kamparanoj estas neniel influata. La kamparanoj dissemiĝis aŭ trikvinope aŭ sep-okope apud la vojo kaj sur la monto; kelkaj tenas la plugilojn ĉe plugado, kelkaj semas, kaj kelkaj sterkas per ekskremento, ĝoje kantante koreajn popolkantojn. Kelkfoje, sencelaj obusoj alpafitaj de la malamikoj kaj bomboj eljetitaj de la malamikaj aeroplanoj rompis la bonordajn kampojn. La bravaj kamparanoj tuj replenigas la kavojn faritajn de la obusoj profitante la paŭzon dum la malamika kanonado, indigne elprenas la obuspecojn kaj tie resemas. Kiam eksonas la fajfo de laborfino, oni laŭkutime ekkrias sur la monto: "Subtenu la militon de la patrolando! Venku la minacon de la bombardo! Batalu por pliprodukto kaj abunda rikolto!"

Ĝi estas mezgranda vilaĝo tuj apud la batalfronto. Ĉi tie la topografio estas iom alta, kun multe da senakvaj kampoj. Depost la eksplodo de la milito, la Usonaj agresantoj per ĉiaj barbaraj rimedoj detruis tiun ĉi pacan vilaĝon kaj ruinigis la konstruaĵojn faritajn post la agrara reformo. Instalaĵoj por agrikultura produktado estis detruitaj, domoj ruinigitaj, tero dezertigita, kaj la instrumentoj kaj ŝarĝbrutoj tre malmultiĝis. Multe da kamparanaj patriotoj estis mortigitaj. Pro tio la kamparanoj ne povis ne transloĝiĝi al la postfronto por pasigi la frostan vintron, kio dezertigis ĉi tiun lokon dum longa tempo.

Tamen la heroa popolo de Koreio neniam sin klinis antaŭ la malfaciloj faritaj de la Usonaj agresantoj. Ĉu maljunulo, ĉu virino, ĉu infano, ĉiu havas malcedan koron. 75-jara maljuna plugisto Sin Kuang-sun diras: "Ju pli furioze la banditoj detruas, des pli unu-anime ni laboras. La korea popolo estas neniam per bombo timigebla. Ni devus rekonstrui la hejmlandon eĉ se restus nur unu el ni ankoraŭ




Ĉinaj Popolaj Volontuloj helpas la koreojn en printempa semado.

vivanta." Tiamaniere ili arde amas la vivon, la laboron, kaj ĉiu memoras firme la alvokon de Generalo Kim Il Sung: La batalo por grenoj estas ankaŭ batalo por la patrolando kaj batalo por garantii la venkon sur la fronto.

Kiam la neĝo sur la monto komencis degeli, la rifuĝintoj ekrevenis sian hejmvilaĝon kun la greno donacita de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Pro la instigo de la registaro, hejmperdintaj fuĝantoj en la apudeco ankaŭ kelkfoje enloĝiĝis en la vilaĝon kaj rapide konstruis tra noktoj aerdefendejojn unu post la alia spite la bombardon. Laŭ la instrukcio de la provinco la gubernio organizis la 70 kamparanajn familiojn enloĝigintajn en malgrandan kolhozon kiu konsistas el 5 laborrotoj (sub kiuj estas pelotonoj kaj grupoj) kun 180 gelaborantoj. La ĉefa direktorio por la administrado de la kolhozo estas la direkta komitato en kiu estas ĉefkomitatano, labordirektoro kaj statistikisto. En la laborrotoj estas ankoraŭ funkciuloj kiuj zorgas pri politika instruado. La registaro provizis la kolhozon per bonaj semoj, 8 bovoj kaj diversaj agrikulturaj instrumentoj antaŭ la komenco de la laborado.

Aŭdinte la novaĵon pri fondiĝo de kolhozo, iu volontula unuo ĉe la dua batallinio, al kiu estis taskitaj batalkampaj servoj, tuj starigis Direktorion por Helpi la Kamparanojn en Sturma Semado ĉe la rezidejo de la 6-a roto, dua bataliono. La vicinstruisto kaj la sekretario de popolaj laboroj gvidas la laboron de la direktorio kiu helpas la kolhozon potage per 200 laborunuoj. Sub la helpo de la ĉinaj volontuloj, de la 15-a de aprilo en la kolhozo komenciĝis regula kolektiva vivo.

Kiam la malamikoj alkanonas, aŭdinte la alarmon la grupanoj aplombe kaj orde eniras la difinitan kontraŭkanonan defendterenon kie en la ŝirmejoj ili interbabilas reciproke diskonigante siajn teknikojn kaj interŝanĝante siajn spertojn. Agitistoj ankaŭ plene utiligas tiun ĉi okazon por raporti pri laborrezultoj kaj voĉlegi la ĵurnalon "Laborista Novaĵo". Kiam la kanoj eksilentas, ili tuj rekomencas streĉan laboradon.



Ĉinaj Popolaj Volontuloj ripozas kaj babilas kune kun la koreoj post laboro en kampo.

Mi detale pririgardis tiun ĉi aliformitan montkamparon. Sur la montdeklivo malaperis la amasoj da kuglokavoj, kaj la brikaj kaj tegolaj ruinaĵoj ankaŭ estas forkolektitaj. Kelkloke plantiĝis vicoj da terpomoj kaj sojfaboj, kelkloke brasiko kreskas kaj kolzo eligis flavajn floretojn. Sur ĉiu kulturebla areo la tero estas plugrenversita. Ĉio montras la novan vivon de la vilaĝo.

Komitatano de la kolhozo Kim Jong-rim, 40-jara laborpartiano, rakontas al mi pri la stato post la komenciĝo de la laboroj. Li diras: Komence de la plugado ni renkontis multe da malfaciloj. Unue estis la problemo de manĝo. Ĉiu kamparana familio tre ŝpare manĝis la rizon donitan de la registaro kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kaj sendis ĉiutage al la monto la geknabojn kiuj ne povas partopreni en la laboradon, por foskolekti sovaĝajn legomojn, amelhavajn arbradikojn kaj sovaĝajn sagitarojn. Per tio la problemo de manĝo solviĝis. Kaj ankaŭ neniu ajn alia malfacilo sukcesis malhelpi la firman volon de la kamparanoj pri reirigo de la produktado. Tute malaperis la antaŭa malnova ideo ke multprodukto neblas sen ĥemia sterkajo. Ĉoj Ĉong-bum de la dua laborpelotono estas modela laborpartiano kiu kuraĝe praktikis novan kulturmetodon. Li gvidis sian laborgrupon plibonigi la terkondiĉojn per natura sterkajo. Li mobilizis la grupanojn alporti teron de ekstere kaj ĝin miksinde kun brultero faris sterkajon por plifekundigi la teron. Tiu ĉi metodo estas aplikata en la tuta kolhozo, kaj tiel la malfacilo de sterkajmanko ankaŭ estas solvita. Ĉoj Ĉong-bum ankaŭ proponis pri diligenta sarkado, diligenta forigo de herbaĉoj, aktiva, preparado de herbosterkajo, kaj tiel penas por akiri abundan rikolton per ĉiaj rimedoj elpenseblaj. La kamparanoj de la tuta grupo firmvole decidis fariĝi ĉefa forto sur la fronto de agrikultura produktado. Kaj dum mallonga tempo

kamparanoj, kiuj estis nespertaj, nun fariĝis spertaj plugistoj.

Mi demandis al Ĉoj Ĉong-bum, de kie li ricevis tian kuraĝon por venki la malfacilojn. Li respondis ekscitiĝe en malflua ĉina lingvo: "La registaro tiel prizorgas nin per provizo de semoj kaj agrikulturaj instrumentoj kaj krome per alsendo de direktantoj; la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ankaŭ nin helpas per greno kiun ili elŝparis el siaj porcioj. Kia do malfacilo ankoraŭ restus nevenkebla?" 49-jara laborpartiano Rim Sun-ji kiu gvidis laborgrupon plenumi la taskon de plugado sur 50,000 pĵung da tero superplane, skribis en sia garantia letero al la direkta komitato: "Por esti bona koreo, oni devas dediĉi al la patrio sian ĉion." En la Maja Tago ŝia tuta grupo daŭre laboris, kaj skribis leteron al Generalo Kim Il Sung jurante ke ili sekvos la ekzemplon de kamparano Sin Vun-sub, glora gajninto de Labora Ordeno.

Parolante pri la produkta entuziasmo de la kamparanoj, Kim Jong-rim diris: "La kolhozo difinis regulon ke ĉiu laboras potage 8 horojn kaj ke oni ankaŭ devas regule partopreni en lernado kaj amuzo. Sed la kamparanoj tute ne konsentas. Ili, unue la laborpartianoj, memvole petas laboron de 10 horoj potage." Poste Kim Jong-rim klarigis: "Dum la regado de la japanaj diabloj la popolanoj estis malpermesataj kulturi la monton, kaj sekve la grenoj ne sufiĉis por la kamparanoj. Post la 15-a de aŭgusto 1945 plenumiĝis la agrara reformo, kaj la kamparanoj kiuj longtempe vivis kiel farmantoj, nun ricevis sian propran teron por kulturado. Kiom ĝojaj ili estas! Kaj la registaro alvokis por kulturado de montoj kaj plibonigo de irigacio. Sekve la agrikultura produktkvanto rapide pligrandiĝis kaj meznombro pli ol duoblojn superis tiun antaŭ la liberiĝo. Se la Usonaj agresantoj ne entreprenis la militon, kiom feliĉa estus nun la vivo! Pro tio la kamparanoj malamegas la Usonajn agresantojn. Krom ilia memvola laborado de 10 horoj potage, kelkaj grupoj eĉ kaŝe sterkas kaj semas sub la lunlumo. Ĉiuj penas por krei novan rekordon en agrikultura produktado. Plie ili skribis kolektivitan leteron al la kolhozo en la najbara gubernio por iniciati produktan konkurson."

Post la fondiĝo de la nova kolhozo, la kolektivismo de la kamparanoj iom post iom plifortiĝas; ili rigardas la kolhozon kiel sian propran hejmon. Kvankam mankas modernaj agrikulturaj instrumentoj kaj traktoroj, tamen la kamparanoj estas plenaj je konvinko. Ili diras: "Ni havas konvinkon resanigi la vundojn kaŭzitaĵojn de la milito, kaj niaj grenoj ankaŭ kreskas fortaj sub la bombardo."

Ĉefkomitatano de la direkta komitato elprenis slipon el sia taglibro kaj ĝin donas al mi ridante: "Vidu, kamarado, jen la batala celo de la kamparanoj." Sur la slipo skribiĝis: Ni multmaniere klopodos por la ĉi-jara pliprodukto kaj abunda rikolto. Krom la pago de impostgreno al la ŝtato, ni starigos infanvartejon per la kolekto de persona ŝparmono, por akcepti la orfojn kies gepatrojn mortigis la Usonaj banditoj. Venontjare post la pliprodukto, ni ankoraŭ fondos batalkampan elementan lernejon.

Grandaj Ekonomiaj Venkoj de Nova Ĉinio

Ŝjue Mu-ĉiaŭ

Direktoro de la Ŝtata Statistika Buroo

Antaŭ liberiĝo, Ĉinio estis duonkolonia kaj duonfeŭda postiĝa lando. Pro la reakcia regado de Kuomintang kaj dekelkajara seninterrompa milito kruela, ĝia ekonomio ne nur ne povis disvolvi, sed kontraŭe estis grave detruita. Dum tiu ĉi periodo, agrikultura produkto malpliĝis preskaŭ 25 procentojn, malpez-industria produkto malpliĝis ĉirkaŭ 30 procentojn, kaj pez-industria produkto, kiu suferis plej multe, malpliĝis ĉirkaŭ 70 procentojn. Ankoraŭ pli grava estis la serioza inflacio kaŭzita de la reakcia Kuomintanga registaro. De aŭgusto 1937 ĝis aŭgusto 1948, la prezoj de varoj plialtiĝis 6-milionoble. La bankbiletoj de ora juano eldonitaj en 1948 fariĝis senvalora papero en malpli ol unu jaro. Konsekvence, normala industrio kaj komerco ne povis esti daŭrigataj. Aperis multaj spekulaciistoj. Eĉ legitimaj industriistoj kaj komercistoj estis devigataj entrepreni ĉefe en spekulacio. La tuta ekonomio de Ĉinio ruiniĝis, kaj la nivelo de la popola vivo terure malaltiĝis.

Tial, post liberiĝo, la ĉefa tasko de nova Ĉinio en ekonomio estis: haltigi la inflacion, stabiligi la prezojn de varoj, subjugi la spekulajn agojn kaj direkti industrion kaj komercon sur normalan vojon; konduki agraran reformon, revivigi kaj disvolvi agrikulturan produkton, plibonigi la vivon de la kamparanoj kaj plialtigi ilian aĉetpovon; revivigi industrian produkton, disvolvi ŝtatan industrion, helpi kaj reĝustigi privatan industrion kaj plibonigi la vivon de la laboristoj per disvolvo de produkto; refunkciigi komunikadon, establi novan komercan sistemon, vigligi la interfluron de varoj inter la urboj kaj la vilaĝoj kaj inter Ĉinio kaj fremdaj landoj por garantii glatan disvolvon de industria kaj agrikultura produktado. Ĉio ĉi estas la ĉefa bazo de nia grandskala ekonomia konstruado estonta por la rapida industriigo de Ĉinio.

Rapida Ekonomia Reviviĝo

La unua granda atingo de la financa kaj ekonomia laboro post la establo de la Centra Popola Registaro estis la haltigo de inflacio kaj stabiligo de financo kaj varprezoj de post marto 1950. Ekde tiu jaro, ni luktis por budĝeta ekvilibro. En 1951 la ŝtata enspezo fakte superis elspezon. La budĝeto de 1952 montras kompletan ekvilibron, kaj duono de la elspezo estas uzata por ekonomia kaj kultura konstruado. Tio estas granda sukceso senkompara en la ekonomia historio de Ĉinio. Por stabiligi la prezojn de varoj, ni, krom ekvilibrigi la budĝeton, plenumis du gravajn taskojn. La unua estas kontroli kaj distribui per la ŝtataj komercaj organizoj diversspecajn gravajn varojn, por plene kontentigi la bezonojn de la merkato. Varoj kiuj estas precipe intime rilataj al la ĉiutaga vivo de la popolo kiel greno, karbo, kotono, ŝpinaĵo, ŝtofo estas liverataj al la popolo en sufiĉa kvanto de la ŝtataj komercaj

organizoj. De post marto 1950, la prezoj stabiligis, nenia nigra merkato ekzistis kaj nenia limigo estis necesa. La dua estas la kontrolo super la cirkula mono fare de la ŝtata banko. Ĉiuj enspezoj kaj elspezoj de registaraj organizoj kaj ŝtataj entreprenoj centriĝis en la ŝtatan bankon, kiu traktas nun la plej grandan parton de deponoj kaj pruntodonoj kaj havas plenan potencon por reguligi la kvanton de moncirkulado kaj stabiligi la financon merkaton.

Rezulte de la supre diritaj sukcesoj, komencante de marto 1950, la prezoj de varoj iom post iom stabiligis. En la tuta jaro de 1951 la prezoj plialtiĝis nur 13.8 procentojn. Ekde oktobro 1951, prezoj pli stabiligis, eĉ iomete malaltiĝis. Dum la unua duono de tiu ĉi jaro ni iniciative malaltiĝis la prezojn de 10,000 specoj da industriaj varoj por ĉiutaga konsumo kaj malaltiĝis la ĝenerala prezindico ĉirkaŭ 5 procentojn. Nun ni havas plenan potencon por kontroli merkatajn prezojn kaj malhelpi prezfluktuojn. Rezulte de stabiligo de prezoj, la spekulacia negoco ĝenerala en la pasinteco ankaŭ iom post iom malaperis. Tio kreis la plej favoran kondiĉojn por disvolvi legitimajn industrion kaj komercon.

Agrikultura Progreso

En ĉiuj tiuj tri jaroj la tuta valoro de agrikultura produkto de Ĉinio pliiĝis 50 procentojn, atingis kaj en kelkaj ĝiaj branĉoj eĉ superis la nivelon antaŭ la Rezista Milito kontraŭ Japanio. Supozu ke la kvanto de produkto en 1949 estis 100, do la gren-produkto en 1951 estis 128, kaj la planita gren-produkto en 1952 estas 140, pli ol la plej alta antaŭmilita produkto; la kotona produkto en 1951 estis 252, la planita koton-produkto en 1952 estas 302, aŭ 50 procentojn super la antaŭmilita nivelo. Kvankam Ĉinio estas agrikultura lando, tamen antaŭ liberiĝo ĝi devis importi de eksterlando grandan kvanton da kotono kaj greno. Nun en tio ĉi ĝi jam memsuficas kaj ne plu bezonas fremdan provizon. Ĝi eĉ povas doni parton de sia greno por helpi siajn najbarajn landojn por solvi ilian malfacilon.

La plej grava kaŭzo de rapida reviviĝo de ĉina agrikultura produkto estas la agrara reformo, kio donis teron al la kamparanoj. En la pasinteco ili pagis al la bienuloj lupagon de 30 milion tunojn da greno. Nun ili ŝparas tiun grandegan tributon kaj ĝian pli grandan parton ili elmetas por reprodukto. Tiel la entuziasmo de la kamparanoj por pliprodukto estas ege altigita. Krome, la registaro donas al la kamparanoj pruntojn, sterkon, novtipajn agrikulturajn instrumentojn, plibonigitajn semojn, insekto-mortigilojn. Precipe la grandskala irigacia konstruado kaj la registara aĉeto de restaĵa agrikultura produkto kaj flankproduktaĵoj de la kamparanoj je raciaj prezoj, kio protektis la kamparanojn kontraŭ ekspluato de spekulaciaj komercistoj,

faris gravan kontribuon al la disvolvo de agrikultura produkto. Precipe indas mension la subjugado de Huaj-rivero komencita lastjare kaj la granda Inundodetenejo de Kingkiang (parto de Jangze-rivero). Laŭ la grandeco kaj rapideco de kompletigo, ili ne nur estas senkomparaj en ĉina historio, sed ankaŭ estas malofte troveblaj en la tuta mondo. Tiuj ĉi konstruaĵoj forigas la minacon de inundo al dekoj da milionoj da kamparanoj, kaj garantias abundan rikolton al vasta areo. En la jaro 1949 la tuta inundita areo estis 120 milion muoj, en 1950 malpliigis ĝis 70 milion muoj kaj en 1951 ankoraŭ malpliigis ĝis 21 milion muoj. Samtempe la kamparanoj organizis interhelpajn grupojn kaj kooperativojn de produktantoj kaj sekve povas pli racie utiligi la teron, tirbestojn, instrumentojn kaj laborforton. Tio ankaŭ rimarkeble altigis la efikecon de agrikultura produkto. La agrara reformo kaj la rapida reviviĝo de agrikultura produkto ege altigis la aĉetpovon de la kamparanoj kaj multe plibonigis ilian vivon. La mizera vivo de ĉinaj kamparanoj sub feŭdaj ekspluato kaj subpremo jam pasis por ĉiam.


Industria Progreso

En la pasintaj tri jaroj la tuta valoro de ĉina industria produkto plimultiĝis pli ol duoble. Kun malmultaj esceptoj, industria produkto jam superis la plej altan nivelon en ĉina historio. La produkto de nia peza in-

malfacila cigareda industrio la planita ĉijara produktokvanto pliiĝos 45 procentojn ol la antaŭ-milita nivelo. Kune kun la reviviĝo kaj disvolviĝo de produkto, nia industrio iom post iom fariĝis memstara kaj sendependa. En la pasinteco nia peza industrio provizis fremdajn landojn per karbo kaj minaĵo, ĉar ni mem ne povis produkti altkvalitan ŝtalon kaj fabriki maŝinon, kaj nia malpeza industrio dependis de fremdaj landoj por provizo de krudaj materialoj kiel kotono, tabakofolioj kaj tritiko. Sed nun tiu ĉi situacio fundamente ŝanĝiĝis.

En la flanko de komunikado kaj transportado, la progreso dum la lastaj tri jaroj ankaŭ estas same evidenta. Precipe en la riparo kaj konstruado de fervojoj, la rapideco estas surpriza. En la jaro 1949 nia forta fervoja regimento, sekvanta la Popolan Liberigan Armeon, riparis la ĉefajn liniojn de la tuta lando, fortigis la malnovajn liniojn, konstruis la novajn, kaj plialtigis la transportan efikecon. Ekz. la Ĉengtu-Ĉungkinga fervojo, vane revita de la loĝantaro en Seĉuan-provinco dum pli ol kvardek jaroj, kompletigis en du jaroj post liberiĝo. La Tienŝuj-Lanĉoŭa fervojo ankaŭ estis kompletigita en aŭgusto ĉijare. La konstruado de Tienŝuj-Ĉengtua fervojo ankaŭ jam komencis. Tiuj ĉi fervojoj kaj aliaj baldaŭ konstruotaj kunligos la fruktodonajn kaj riĉajn Nordokcidenton kaj Sudokcidenton kaj metos gravan fundamenton de estonta konstruado de industrio.

La rapida disvolvo de industria produkto kaj komunikado estas la rezultato de penado de ĉiugradaj registaroj kaj de la vasta laborista klaso. En la lastaj tri jaroj kvankam la financo de la registaro estis konsidereble malfacila, tamen ĝi malpliigis la elspezojn kaj investis monon al ŝtataj industrioj kaj fervoja konstruado grandskale, metis multajn mendojn kaj donis pruntojn al la privataj fabrikoj por solvi ilian malfacilajn kaŭzitan de manko de kapitalo. La registara investo al industria konstruado plialtiĝis ĉiujare. En tiu ĉi jaro nia investo al ekonomia konstruado estas 150 procentojn pli alta kaj okupas 36 procentojn de la tuta elspezo. En la pasintaj tri jaroj la ŝtataj entreprenoj kaj kelkaj privataj industrioj efektivigis demokratajn reformojn kaj plibonigis administradon. Komencante de la lasta jaro disvolviĝis la kampanjo de pliiĝo de produkto kaj praktiko de ŝparo, kiu grande rapidigis disvolvon de industria



Ĉiuj atingis novan rekordon

de Hua Kjun-vu

dustrio multe altiĝis. De post liberiĝo, la kvanto de karba kaj elektra produkto pliiĝis preskaŭ duoble, ankoraŭ multe pliiĝis tio de fero, ŝtalo kaj maŝino. La pliiĝo da produktaĵo de aliaj pezaj industrioj ankaŭ estas evidenta. Ĉijare, krom karbo, la produktoj de ĉiuj pezaj industrioj superos, eĉ pli multe, la plej altan produkto-kvanton en ĉina historio. La disvolvo de malpezaj industrioj ankaŭ estas same evidenta. Ekz. en 1951 la produkto-kvanto de koton-ŝpinaĵo, kiu okupas ĉefan lokon en la malpeza industrio, plimultiĝis 24 procentojn ol tio de 1949, la planita produkto-kvanto de 1952 pliiĝos 62 procentojn pli ol tio de 1949 kaj multe superos la jaran antaŭ-militan (1937) produkton. En la pasintaj tri jaroj pliiĝis 2.5-oble kaj pli ol duoble pliiĝis ol la antaŭ-milita nivelo. Aliaj produktoj de malpezaj industrioj ankaŭ evidente pliiĝis, eĉ de la plej

produktado. La vasta laborista amaso sub la gvidado de la registaro fervore disvolvas produktan konkurson patriotisman, prezentas diversajn raciigajn proponojn, kaj plialtigas labor-efikon. Ekz. la laborproduktivo de ministoj preskaŭ duobliĝis en la lastaj tri jaroj, kaj tio de ŝpineaĵaj laboristoj 50 procentojn.

Rezulte de rapida revigliĝo de industrio-produkto kaj de komunikado, la vivo de laboristoj evidente pliboniĝis, kaj la fenomeno de grava senlaboreco ankaŭ iom post iom foriĝas. En la pasintaj tri jaroj la registaro jam ĝenerale reĝustigis kaj plialtigis la salajron. La meznombra salajro de la laboristoj en 1952 estas de 60 ĝis 120 procentojn pli ol en 1949. Post la publiko de la *Sindikata Leĝo* kaj la *Laborasekura Regularo*, komencante de la unua de majo 1951, la laborasekura sistemo universale adoptiĝis en ĉiu fabriko

enhavanta pli ol 100 personojn. La antaŭ nelonge publikigitaj *Decidoj pri Enlaborigo* provizas ĝeneralan solvon de la problemo de senlaboreco en pozitiva, planita kaj sistema maniero. Sur la bazo de disvolvata produkto nia registaro estas konstruanta loĝejojn por laboristoj, establanta hospitalojn, infanvartejojn, kaj sanatoriojn, kaj pliboniganta arangojn de sekuraj antaŭzorgoj. En la ŝtataj fabrikoj, laboristoj elektis reprezentantojn al produktaj administraj komitatoj; en privataj fabrikoj, kiel mastroj de la lando, la laboristoj konsiliĝis kun la kapitalistoj kiel revivigi la produkton kaj reguligi la rilatojn inter la laboristoj kaj la kapitalistoj.

Enlanda kaj Eksterlanda Komerco


En la lastaj tri jaroj nia enlanda komerco establiĝis sur nova bazo, kiu estas la divido de laboro kaj kunlaboro inter la ŝtata komerco, kooperativo kaj privata komerco. Antaŭ liberiĝo nia komerca sistemo en la urbo kaj vilaĝo jam estis tute ruinigita dum la milito kaj inflacio. Post liberiĝo ni forte penadis organizi interfluan de produktaĵoj inter la urboj kaj vilaĝoj, helpi kamparanojn forvendi la restaĵojn de iliaj agrikulturaj produktaĵoj kaj flankproduktaĵoj, kaj vendi al ili industriajn produktaĵojn de la urbo. De la lasta duono de 1950 la komerco inter la urboj kaj vilaĝoj iom post iom vigliĝis. La tuta sumo de la enlanda komerco en 1951 plimultiĝis 30 procentojn kompare kun 1950. Sekve ne nur la ŝtata komerco kaj kooperativo sed ankaŭ la privata komerco grandskale disvolviĝas.

Nia internacia komerco daŭre disvolviĝas malgraŭ la limigo de blokado kaj malpermeso gvidataj de Usono. La tuta sumo de importoj kaj eksportoj dum 1951 dubligas tion de 1950, jam superanta la plej altan rekordon en la historio. Estas atendate, ke tio de 1952 ankoraŭ rimarkeble plialtiĝos. Se la blokada politiko de Usono havis ian efikon, tion montras en la fakto, ke unue la proporcio de nia komerco kun la kapitalistaj landoj multe malaltiĝas, dum tio kun la Soveta Unio kaj aliaj popolaj demokratioj multe altiĝas; kaj due efektiviĝis ekvilibro inter importoj kaj eksportoj post kelkdek jaroj da eksceso de importoj. Sendube tian efikon ni tute ne timas.

Remuldo de Ekonomio en Ĉinio

Antaŭ liberiĝo la malnova Ĉinio estis regata kaj ekspluatata de kapitalismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Tri jaroj post liberiĝo la ekonomia kaj socia aspektoj en Ĉinio tute ŝanĝiĝis. Unue, ni parolu pri kapitalismo, kiu regis Ĉinian financon kaj tenis en siaj manoj la plej gravajn branĉojn de industria produkto. Post liberiĝo ni nuligis la specialan privilegion de imperiismo en Ĉinio, sed permesas la entreprenojn kun fremda kapitalo daŭrigi la funkciadon kondiĉe ke ili observas la leĝojn kaj regulojn de la ĉina registaro. Tamen, nun nuligis la specialaj privilegioj, sur kiuj dependas fremdaj entreprenoj por disvolvi siajn negocojn, tial multaj el ili ne povas daŭre funkcii ĉar ili ne povas sin adapti al la novaj kondiĉoj en Ĉinio. Plej multe el la entreprenoj financitaj de Usona kapitalo transiĝis sub nian kontrolon, post kiam Usono frotigis ĉinajn posedaĵojn. Entreprenoj de aliaj imperiistaj landoj ankaŭ renkontas grandajn malfacilojn pro la Usona politiko de blokado kaj embargo. La tempo de kapitalista regado super Ĉinio evidente jam pasis por ĉiam.


Due, la agrara reformo jam kompletiĝis en regionoj kun 420,000,000 loĝantoj. Krom la regionoj de minorita-



toj, agrara reformo kompletiĝos en tiu ĉi vintro aŭ venonta printempo. La feŭdismo reginta Ĉinion por pli ol du mil jaroj baldaŭ tute eliminiĝos. Al dudek milionoj da bienuloj, kun escepto de tre malmulte da lokaj despotoj, ankaŭ estas disdonita grundo same kiel al la kamparanoj. Ili sin remuldas tra laboro, kaj grandparte el ili povas iom post iom ŝanĝi sian klason de feŭdaj bienuloj al la tiu de laborantaj popolanoj. Tio estas alia granda ŝanĝo en ĉina socia ekonomio.

Fine, la ekonomio de la burokrataj kapitalistoj estis tute konfiskita kaj tra demokratiaj reformoj estis ŝanĝita en socialisman ŝtatan ekonomion. En la pasintaj tri jaroj niaj ŝtataj industrioj sub la penado de la registaro kaj vasta amaso de laboristoj kaj funkciuloj la tuta valoro de produkto pliiĝis pli ol 200 procentojn, sekve en la pli gravaj industrioj, ŝtata ekonomio jam okupas superan aŭ gravan lokon. Ekz. de la peza industrio la ŝtato posedas 80 procentojn; de la malpeza industrio 40 procentojn, kaj de certaj gravaj fakoj de malpeza industrio, ekz. la ŝpina kaj teksa industrio, meznombro 50 procentojn. En la sfero de modernaj komunikaj entreprenoj, la ŝtato funkciigas ĉiujn fervojojn kaj ĉirkaŭ 60 procentojn de la navigacia transportado. En la pasintaj tri jaroj, la ŝtataj bankoj grande disvolviĝas. Nun ili kontrolas pli ol 90 procentojn de ĉiuj deponoj kaj pruntodonoj. Se ni enkalkulas la bankojn kune posedataj de publikaj kaj privataj interesoj, la figuro leviĝas ĝis 98-99 procentojn. Kvankam ni ankoraŭ ne proklamis la statigon de bankoj tamen en la pasintaj tri jaroj la privataj bankoj iom post iom ĉesis funkcii, ĉar ili ne povis sin adapti al la ŝanĝita financa situacio. La disvolvo de la ŝtata komerco ankaŭ estas tre rapida. Nun ĉirkaŭ 90 procentojn de nia importa kaj eksporta komerco estas traktata de la ŝtato. En la enlanda komerco, de 40-100 procentojn de pogranda negoco en esencaj varoj kiel ekz. grenoj, karbo, kotono, ŝpinaĵo, ŝtofo, salo, sukero, ŝtalo, fero, ligno kaj cemento, kiuj estas gravaj al la ĉiutaga vivo aŭ al la industria disvolviĝo, estas nun en la manoj de la ŝtataj komercaj kompanioj. En la pomalgranda negoco la ŝtataj entreprenoj kaj kooperativoj konsistigas 30 procentojn. Pro tio la registaro jam havas sufiĉan potencon por kontroli la prezojn en la merkato, kaj tra la reguligado de prezoj ĝi orientigas la disvolviĝon de la privataj komerco, inindustrio kaj agrikultura produktado.

Kvankam la ŝtata ekonomio grande disvolviĝas, tamen la privata industrio kaj komerco sub la gvidado





慶祝亞細亞及南洋區域和平會議之勝利！

Sukceson al la Paca Konferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

Plakato designita de Ŝa Kengze

Granda Akiraĵo de

En lastaj tri jaroj la liberiĝinta ĉina popolo a disvolviĝo de la nacia ekonomio. Ili alportas can kaj ekonomian situaciojn. Jenaj bildoj m





La kluzo 1.054 metrojn longa de la Kingkiang-a Rivero, unu el la grandaj akvokonservaj konstruaĵoj de Ĉinkiang-a sekcio estis konstruita.

Fandfornoj en iu restatita ferfandejo. La pli kaj pli grandiĝanta ferprodukto jam superas la plej altan nivelon en ĉina historio.

Ĉinio havas nun pli kaj pli grandiĝantan kemian industrion. Tiu ĉi fabriko produktas amoniakan sulfaton. La rapida disvolviĝo de agrikulturo post la agrara reformo multe grandigis la bezonon de kemiaj fekundajoj.

Stalin-6a kombajno rikoltanta tritikon en la plej modernaj farmoj de Ĉinio.




Paca Konstruado

iris okulfrapan sukceson en la restatigo kaj fundamentajn ŝanĝojn por plibonigi la finan-
ontras parton el la grandskala konstruado.




svodetena Baseno ĉe la meza parto de la Jangze-
aĵoj. Tiu ĉi kluzo kaj ceteraj konstruaĵoj laŭ
npletigita en nur 75 tagoj.





Moderna ole-rafinejo. Ĉinio havas riĉajn ol-
kampojn. La produkto de kruda oleo en 1951 est-
70% pli alta ol tiu en 1949. En la sama periodo
produkto de gasoleno kreskis 50%, kaj petrolo 40%

en ŝtata farmo. En la unuaj 52 ŝtataj
aj teknikoj estas enkondukitaj.




N-ro 1 Nordokcidenta Ŝtata Kotona Teksejo. Pro la altiĝo de
vivonivelo de la popolamaso ĉiaj konsumaj kaj precipe teksajoj
el modernaj fabrikoj kia tiu ĉi teksejo trovas rapidan forvendon.







Nova haveno Ŝinkang proksime al Tienzin estas unu el la plej grandaj ŝirmitaj havenoj en la mondo kaj estos la ĉefa mara elirejo por Norda Ĉinio. La bildo montras mekanikan karbo-transportilon por provizi ŝipojn en la haveno.




La Tienŝuj-Lanĉoŭa Fervojo 360 kilometrojn longa estas finkonstruita je la 23-a de aŭgusto dek monatojn pli frue ol la difinita plano. Tiu ĉi etendiĝo de la Lunghaj Fervojo kuranta orienten al Hajĉoŭ ĉe la Flava Maro formale malfermiĝis por transportado je la 1-a de oktobro.

Ĉengtu-Ĉungkinga Fervojo konstruita ekde junio, 1950 kaj finkonstruita en julio, 1952 estas la unua fervojo konstruita per nur ĉinaj materialoj. La konstruintoj konkeris la plej malfacilan vojon por malfermi la riĉan regionon de Seĉuan.

Plibonigo en Transportado



Unu el la aeroplanoj de la Popola Aviada Korporacio de Ĉinio, kiu kunligas la ĉefajn centrojn de vasta Ĉinio tra la aero.



Proporcio de la tutaj po-detalaĵoj vendoj kaj aĉetoj

kaj helpo de la ŝtata ekonomio ankaŭ reviviĝas kaj disvolviĝas. Laŭ statistikoj de ok urboj, Ŝanhajo, Tienzino, Pekino, Uhano, Kantono, Ĉungkingo, Siano, kaj Ŝenjango, dum tiuj ĉi du jaroj de januaro 1950 ĝis decembro 1951, la privataj industrioj kaj komerco montris plimultiĝon de naŭdek du mil firmoj, t.e. pliiĝon de 27 procentojn. La privataj industrioj dum la lastaj tri jaroj pliiĝis la tutan produkt-kvanton 70 procentojn. La privataj industrioj kaj komerco ne nur estas reviviĝantaj kaj disvolviĝantaj, sed ankaŭ paŝon post paŝo reĝustiĝas kaj reformiĝas. El ili, tiuj kiuj estas urĝe utilaj al kaj bezonataj de la popola vivo kaj de ŝtata ekonomio, estas rapide disvolviĝantaj, dum tiuj ne utilaj kaj ne bezonataj estas iom post iom mortantaj. La gvidado de la ŝtata ekonomio super la privataj industrioj kaj komerco plifortiĝas ĉiutage. Ĝenerale grandparte de la pligrandaj privataj fabrikoj akceptis la mendojn de la registaro kaj de la ŝtataj entreprenoj, eĉ subskribis longdaŭrajn vendo-kontraktojn, kaj estas progresanta al kuna ŝtata kaj privata funkciado.

La individua ekonomio de kamparanoj kaj metiistoj estas organizita en kooperativojn, per kiuj ĝi estas gvidata kaj helpata de la registaro kaj ŝtataj entreprenoj. Je la fino de junio de tiu ĉi jaro, jam ekzistas tridek-ses mil bazaj kooperativoj, kun cent kaj ses milionoj da membroj. Tiuj ĉi kooperativoj estas nove starigitaj post liberiĝo. La tuta vend-sumo de kooperativoj dum la lasta jaro jam atingis dek procentojn de la tuta vend-sumo de la pomalgrandaj negocoj ambaŭ ŝtataj kaj privataj. La tuta aĉet-sumo de agrikulturaj produktaĵoj de kooperativo atingis 60 ĝis 70 procentojn de la tuta aĉet-sumo de la ŝtata aĉeto (neenhavante la privatan). Estas evidente ke la kooperativoj jam okupas gravan lokon en la kvin elementoj de nia ekonomio.

El la diritaj faktoj, ne estas malfacile por ni vidi ke nun Ĉinio ne plu estas duon-kolonia kaj duon-feŭda lando, nek kapitalisma, sed novdemokratia lando. Ni havas ĉiam plifortiĝantan socialisman ŝtatan ekonomion, kiu direktas la gravan ekonomian vivon de la ŝtato, kaj certigas sian gvidan lokon rilate al aliaj ekonomiaj elementoj. En nuntempa Ĉinio kvankam la entreprenoj de privata kapitalismo (enhavante tutan industrion kaj komercon) ankoraŭ nombre superas la ŝtatajn, sed ili dependas al la gvidado de la lastaj tagon post tago, precipe la pligrandaj privataj fabrikoj, kiuj fabrikas por ŝtataj mendoj sub la gvidado de ŝtata ekonomio kaj

produktas laŭ la plano de la ŝtato, kio estas evidente malsama ol la blinda produkto en la pasinteco. La ŝtata ekonomio per la kooperativoj gvidas la disigitajn multnombrajn individuajn farmojn kaj malgrandajn laborejojn produkti laŭ la ŝtata plano. Tia maniere ĝi ebligas nin efektigi la ekonomian konstruadon laŭ plano, kaj certigi ke nia lando tra konsidereble longtempa ekonomia konstruado, povas firme paŝi al brila socialismo.

Venonta Ekonomia Konstruado

Nelonge post establo de la Centra Popola Registaro, Prezidanto Maŭ instruis al ni ke en tri aŭ pli ol tri jaroj ni devas penadi por radikale plibonigi la financon kaj ekonomian situacion. Lastjare Prezidanto Maŭ denove instruis al ni ke en tri jaroj (1950-1952) ni devas kompletigi la preparan laboron por grandskala ekonomia konstruado. Nun la glora devo donita al ni de Prezidanto Maŭ jam estis sukcese kompletigita sub la penado de ĉiugradaj popolaj registaroj kaj la tuta popolo. En tri jaroj ni jam sukcese kompletigis la restatigan kaj remuldigan laborojn de nia nacia ekonomio. Ĉijare nia industria kaj agrikultura produkto jam ĝenerale reatingis la plej altan nivelon en la historio. El ĝi la ĉefaj fakoj jam superas tiun ĉi nivelon. En la Nordoriento jam komenciĝis grandskala ekonomia konstruado, kaj la grandskala tutlanda ekonomia konstruado baldaŭ komenciĝos ankaŭ. La tuta popolo sub la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ kaj de la Centra Popola Registaro jam montris sian entuziasmon kaj decidemon en la batalo por industriigi nian landon.

Kaŭze de nia novdemokratia politika kaj ekonomia sistemo, kaj la helpo de la socialisma lando—Soveta Unio, nia ekonomio disvolviĝas tre rapide. Nia ekonomia sistemo estas progresema, sed teknike ni ankoraŭ postigis. Nia lando ankoraŭ estas agrikultura lando. Moderna industrio ankoraŭ konsistigas multe pli malgrandan procentojn de la popola ekonomio ol tio en la popolaj demokratioj en Orienta Eŭropo. Por ke la postiga agrikultura lando fariĝu progresema industria lando, la tuta popolo ankoraŭ devas penadi tra konsidereble longan tempon. Unue, ni devas utiligi niajn riĉajn materialajn rimedojn por grandskale disvolvi pezajn industriojn, kiel feran, ŝtalan, maŝinfabrika, karban, elektropovan, petrolan, kaj aliajn por meti la fundamenton de industriigo. Por ekspluati la riĉan materialan rimedon en la Nordokcidento kaj Sudokcidento, ni devas grandskale ripari kaj konstrui fervojojn, kaj plibonigi la komunikadon kaj transportadon. Samtempe por plenumi la kreskantajn ĉiutagajn bezonojn de la popolo, kaj la postulon de krudaj materialoj de nia disvolviĝanta industrio, ni devas ankaŭ disvolvi malpezan industrion kaj agrikulturan produktadon. En la ekonomia konstruado ni bezonas grandan nombron de teknikistoj, kaj nia kultura kaj eduka aferoj devas disvolviĝi ankaŭ. Tial ni devas disvolvi diversajn ekonomiajn kaj kulturajn entreprenojn ĉirkaŭ la centra tasko de disvolvado de peza industrio.

La rapideco de nia ekonomia disvolvo estis tre alta, tamen la ĉina popolo ne estas kontenta pri la atingajo. Unuiĝinte sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Centra Popola Registaro ili kunigos siajn fortojn kaj luktos por industriigo kaj la brila perspektivo de socialismo laŭ la ĝenerala konstrua plano de la nacio. Ni iros de venko al venko kaj plenumos la gloran taskon, kiun historio donis al ni.

Tradukis: W. S. Ho.

Mia Impreso pri Nova Ĉinio

Parolado ĉe Adiaŭa Kunveno Aranigta de Ĉina Pacdefenda Komitato

D-ro Hewlet Johnson

Dekano de Canterbury

Amikoj kaj kamaradoj kiuj batalas por paco, en tiu ĉi adiaŭa momento ni certe sentus grandan ĉagrenon se ni ne scius ke ni jam antaŭ foriro duoble armis nin per ĉio kion ni aŭdis kaj vidis en via granda lando por ke ni povu batali kune kun niaj patriaj kamaradoj por paco en la Okcidento.

Via intima kaj ĉiuflanka prizorgado faris nian vojaĝon treege komforta kaj ni plenumis nian planon iri de Kantono al Ŝenjang kaj de Hangĉou kaj Ŝanhajo al Hango kaj Ŝasi nur dank' al la ĉiama priatento fare de tiuj karaj kamaradoj kiujn vi komisiis por akcepti nin.

Tiu ĉi vojaĝo estas tre agrabla kaj havas edukan signifon. Per nia persona sperto ni komprenis la signifon de la liberigo de Ĉinio kaj la signifon de la liberigo el japana invado kaj imperiista kolonia regado.

Persone ni vidis la vivon de la terkulturistoj liberigitaj el feŭdalista sklaveco kaj iliaj liberaj edzinoj kaj filinoj. Tiuj liberigo kaj libereco jam riĉigas la familian vivon kaj multe plialtigas la produkt-povon de la tero.

Unu fakton ni vidis kaj tiu fakto havas gravan signifon por Britlando. Unuafoje en historio aperas tiaj tricentmilionoj da terkulturistoj kiuj havas monon por elspezi kaj tre volas aĉeti la grandajn kaj malgrandajn agrikulturajn ilojn kiujn povas fari niaj teknikistoj kaj laboristoj kaj interŝanĝas la de ni urĝe bezonatan tungoleon por la sterko kiun povas fabriki niaj kemiistoj.

Via registaro tiel zorgeme kaj pene helpis la terkulturistojn ke la katastrofo daŭrinta de generacio al generacio fariĝas fidela servisto alportanta bonon al ĉiuj homoj. Vi subjugis viajn grandajn riverojn, malebligante inundon dum superakvega periodo kaj utiligante ilin por irigacio en seka vetero.

Mi bone scias pri tiuj grandaj konstru-laboroj en Sovetunio kaj Orienta Eŭropo sed, parolante pri malfaciloj kiujn vi konkeris, mi neniam vidis tian konstru-laboron kiu egalas la vian koncerne al rapideco kaj grandeco. Per 1,000 metrojn longa kluzo vi sekure alkondukas la ondantan torenton de Jangze-rivero dum superakvega periodo en grandan konservejon ĝis kiam forpasas la danĝera tempo.

Pro via speciala prizorgado ni estis provizita per aparta aeroplano kaj povis iri kaj fari viziton tie en la tago antaŭ la finiĝo de la konstru-laboro. Kiam ni restis kun la laboristoj, ni vidis kiel diligente kaj lerte ili laboris, kian varmegan entuziasmon ili havis kaj kiel profunde ili sentis dankemon al la granda patro de la lando, Prezidanto Maŭ kun liaj kamaradoj, al li kiu savis ilin ĝustatempe el la rapide proksimiĝanta danĝero.



Doktoro Hewlet Johnson vizitas Ekspozicion de Bakteria milito, la Krimaj Agoj de Usona imperiismo.

Tiu ĉi granda laboro daŭris nur tri monatojn ekde la komenco ĝis la finiĝo kaj en tiu periodo estis malbona vetero por tuta monato kiam pluvis torente. Miaj inĝenieraj okuloj spertis profundan eksciton kiun mi neniam antaŭe spertis, kiam mi staris antaŭ la konstruaĵo kaj, levante miajn okulojn, rigardis tiujn grandajn kluzpordojn kiuj sekvas unu post la alia por la distanco de 1,000 metroj.

Mi havis la saman senton ĉe alia granda konstruaĵo. Ĝi forigis por ĉiam el la Huaj-rivera regiono tiun teruran aspekton de superakvego kaj malsatego kiun mi vidis propraokule en 1932, kaj faris ĝin eterna ĉina grenejo kie ĉiuj familioj kondukas feliĉan kaj prosperan vivon.

Ĉio ĉi tio estas kreita de la popolo. Vi laboras por la popolo kaj la popolo laboras por vi kaj kreas tiujn grandajn atingojn.

Kaj, kiel homo kiu pasigis sian junecon meze de grandnombro da fabrikoj en Lancashire, mi vidis kun grandega intereso la jut-fabrikon en Hangĉou.

La produkto-kapablo de tiu fabriko donas profundan impreson. Kompare al tiaj fabrikoj en Britlando tiu ĉina fabriko montras grandajn plibonigojn.

La maŝinoj estas malalte fiksitaj kaj la laboristoj ne sentas sin dronataj en amasegon da maŝinoj kiel ĉevaloj kun okul-ŝirmiloj. Psikologie la fabriko estas konstruita laŭ perfekta plano kaj ĉio tiel bona harmonias kun la ĉirkaŭaĵo: ĝardeno, dormejo, kaj infanvartejo, ke ĝi estas la plej bela fabriko kiun mi iam vidis.

Ĝoje mi aŭdis ke, se estas necese, la aliaj ĉinaj industrioj ankaŭ povas funkcii tute sendepende. Tio jam okazas en jut-fabrikado. Ĉinio produktas juton por sia propra konsumado kaj samtempe produktas grenojn per scienca agrikultura metodo, ne malpliigante gren-produktadon.

Mi sentas doloron pro la perdo de negoco kaŭze de la fakto ke Ĉinio estas devigata al memstara fabrikado. Tamen mi aŭdis ke Ĉinio ne tiel esperas sed volas negoci kun ni por reciproka bono kaj mi sentis grandan kontenton.

*Mi vidas kun kontento la novan higienan staton de Ĉinio kaj la lukton ekstermi muŝojn, moskitojn, cimojn kaj ratojn. Ĉie ni trovis tiajn sloganojn grandajn kaj malgrandajn.

En Kantono estas solvita por 250,000 loĝantoj la problemo pri akvo-provizado kaj laveja aranĝo kion antaŭe ili preskaŭ tute ne povis ĝui.

En Tienzin finkonstruiĝis kloakoj longaj je 200 kilometroj.

En Ĉangŝa estis transportitaj pere de memvola laborado 12,000 tunoj da ruboj amasiĝintaj dum kelkaj jarcentoj. Kaj tra tiu malpura distrikto estas pavimita nova avenuo kondukanta de la stacio al la riverbordo kun kompletaj modernaj dreniloj.

Antaŭ la komenco de la malbenita bakteria milit-atako liberigita Ĉinio jam klopodis grandskale pri tiuj higienaj laboroj.

Per sperta scienca tekniko kaj nevenkebla kuraĝo ili batalas kontraŭ la bakteria milito, kiu antaŭenpuŝas la ondon de higiena reformo kaj faris Ĉinion lando plej priatentanta higienon kaj pioniro sur la vojo al pozitiva higieno.

Fine mi mencias la bakterian militon. Mi sentis profundan honton, kiam mi aŭdis pri tiu terura malhumana agado. Pli hontinda estas la fakto ke tiu malhumana agado estas farata de lando kiu aŭdace sin nomas kredanto de "kristanismo."

En Ĉinio neniu dubas pri la realeco de tiu agado. Tiu, kiu vizitis la lokojn atakitajn kaj parolis kun okulatestantoj same kiel mi, havas nenan dubon pri la fakto.

Sed en Britlando estas homoj kiuj tion ne kredas. Iuj diris al mi ke Usono ne povas degeneri ĝis tia grado. "Tio estas la propagando de la komunistoj."

Nun, ĝuste pri tiu ĉi fakto, mi forportos de Ĉinio la plej fortan batalilon per kiu mi batalos por paco.

En ĉiu urbo kien mi venis mi konscie faris kontaktojn kun la gvidantoj de kristanaj eklezioj, la episkopoj konsekritaj de la eklezioj de Canterbury, Metodistoj kaj Baptistoj, pastroj kaj membroj de la Roma Katolika Eklezio kaj multaj aliaj homoj.

Mi babilis kun ili kaj faris al ili demandojn. Unuvoĉe ili sciigis min pri kvar aferoj: (1) Religio

estas libera en Ĉinio; (2) Ili kore bonvenigas la novan vivon en Ĉinio; (3) Ili kontraŭstaras la subjugadon de Ĉinio kaj ĉina kristanismo flanke de fremdaj landoj; (4) Ili firme kredas ke bakteria milito estas fakto kaj ili solidariĝas kun la tuta ĉina popolo por kontraŭi ĝin. Kristanaj kuracistoj, flegistoj kaj ĝenerala kristana publiko partoprenas tiun ĉi lukton en Ĉinio kaj Koreio.

Mi kunportos al mia lando serion da dokumentoj universale subskribitaj de la gvidantoj de diversaj ĉinaj kristanaj eklezioj por protesti kontraŭ la bakteria milito kaj alvoki la Britlandajn kristanojn kondamni unuanime tian agadon kaj mi estas preta sendi ilin al miaj propraĵoj kaj aliaj kristanaj eklezioj.

Kristanoj kiuj konsistigas tre grandan parton de nia popolo, ne plu povos konsideri la raporton pri bakteria milito kiel propagando kaj ne kredi ĝin. Tio estas ja provoko kiun ili devas rigardi rekte en la vizaĝon. Alie ili kreus teruran fendegon inter la orientaj kaj okcidentaj kristanoj.

Mi reiros al Britlando plena de kredo kaj espero kaj mi estas dankema al vi pro tiu valora pac-batalilo.

Tempo ne permesas al mi diri ion pluan. Mi ne povas fini en mallonga tempo kion mi volas diri.

Sed konklude mi devas aldoni kelkajn vortojn.

Mi estimas vian grandan konstru-laboron.

Mi estimas viajn irigaciajn konstruaĵojn kaj protektajn forstzonojn.

Mi estimas viajn purigitajn urbojn, viajn novan industrion kaj novan agrikulturon. Sed, krom ĉio ĉi tio, kion mi plej estimas estas la granda ŝanĝo en la moralo-nivelo de via tuta popolo.

Tiu ĉi ŝanĝo en moralo-nivelo instigas ĉiujn agi unue por la aliaj kaj poste por si mem.

Tiu ĉi ŝanĝo en moralo-nivelo realigita nur post multaj malfacilaj luktoj similas al la sento de vera kristano kiu sin ofertas inspirite de Dio. Ĉu estas io pli nobla kaj alta ol sinofero al la homaro ĉirkaŭ ni?

Tio estas la vera fonto de ĉio granda kion mi vidis en Ĉinio.

Enkarnita en via granda gvidanto, Prezidanto Maŭ kaj aliaj fidelaj gvidantoj, en via heroo Popola Liberiga Armeo, en ĉiuj lokoj kaj ĉiuj profesioj estas tiu ĉi granda spirito ke ĉiu estas por ĉiuj kaj ĉiuj por ĉiu.

Tiu estas la spirito kiun aspiras la nuna tempo.

Estas tiu spirito kiu kondukas al paco.

Estas ankaŭ tiu spirito kiu plene garantias la akiron de rapida kaj kompleta sukceso.

Trad. I. K.

Prezentado de diversaj operoj

En Ĉinio estas multe da specoj de operoj. Por ke ili povu lerni reciproke kaj interŝanĝi la spertojn por plibone antaŭenpuŝi la disvolviĝon kaj reformon, la Kultura Ministerio de la Centra Popola Registaro decidis okazigi operan prezentadon je la 6a de oktobro. La prezentado de diversaj operoj daŭros 23 tagojn kaj partoprenos aktoroj de pli ol 20 diversaj lokaj operoj.

La Miraklo

de Tiu ĉi Somero en Pekino

Sen Ĵung

Dum la nokto de pasintaj someroj, oni ĉie trovis en Pekino amasiĝantajn insektojn flugantajn super stratoj kun densaj arboj. Sed tiun ĉi jaron ĉiuj stratlampoj elsendis specialan brilon. La insektoj ĉirkaŭ la lampbrilo jam tute malaperis. Mi memoras, ke je la sama periodo antaŭ du jaroj multaj loĝantoj jam pendigis moskitvualojn. Sed tiun ĉi jaron multaj loĝantoj ankoraŭ ne elprenis ilin. Oni rimarkis precipe la fakton, ke muŝoj jam treege malmultiĝis.

Tiu kiu havas iom da scio pri publika higieno komprenas kiel eksterordinara estas tiu ĉi miraklo. Ekzemple, en somero ĉiu paro da muŝoj povas generadi po du centoj en dek tagoj, do post unu sezono la nombro de iliaj filoj kaj nepoj superas tiun de la tuta loĝantaro de la mondo. Laŭ la ordinara principo de publika higieno, por ekstermi muŝojn, moskitojn, kaj aliajn oni devas posedi superajn higienajn rimedojn. Tio estas ke ni devas pesedi kompletan sistemon de modernaj kloakoj kaj en ĉiu familio traakvumilon en la necesejo kaj sufiĉe da medikamentoj k.t.p. Nuntempe, en Pekino nur unu procento el la loĝantaro posedas traakvumilojn en siaj necesejoj. Eĉ laŭ la mirinda rapideco de la progreso de nova Ĉinio oni ankoraŭ bezonas longan tempon por tute posedi tiujn ĉi rimedojn.

Jan King-ĉing, la ĉefo de la Higiena Buroo de Pekino, specialisto de higieno, diris al mi jenan interresan rakonton. Antaŭ la Rezista Milito kontraŭ Japanio, iu urbestro nomita Ĉoŭ Ta-ven sentis ke la multeco de muŝoj multe embarasis lin. Li precipe invitis kelkajn specialistojn de higieno por konsultado. Por ekstermi muŝojn necesas fari tiajn grandajn penojn ke ili terurigas tiun sinjoron urbestron kaj de tiam li forlasis tiun ĉi ideon.

Ne estas tre malfacila afero ekstermi muŝojn en tiuj loĝejoj, kiuj estas kunigitaj kun kloakoj kaj en kiuj troviĝas traakvumiloj en la necesejoj. Sed nun la eliminado de muŝoj estas en skalo de la tuta Pekino. Oni precipe atentis la kvartalon kie amase loĝas laboristoj. Antaŭ du semajnoj la Vicurberstro Vu Han mem inspektis la higienajn kondiĉojn de kvar ĉefaj legombazaroj en la urbo. Sed li ne trovis eĉ unu muŝon. Eble tiu legombazaroj provizore faris antaŭan preparon certe ne povus ekstermi ĉiujn muŝojn. La subĉiela bazaro de la Ĉaŭjangmen-strato estis antaŭe la plej malpura el la kvar legombazaroj. Sed tiun ĉi jaron ĝi fariĝis modelo.

Ĉiuj fekaĵ-sekigejoj ekster la urburo nun estas translokitaj. Antaŭ la transloko mi vizitis kelkajn sekigejojn ekster la Fuŝing-pordego kaj Lungvang-templo. Laboristoj de fekaĵo-sekigejo diris al mi, ke antaŭe dum somero ilia manĝaĵo, maizpano, ĉiam fariĝas nigra. Tio signifas ke ĝi ĉiam estis kovrita de muŝoj. Tia cirkonstanco jam tute ŝanĝiĝis en tiu ĉi jaro. Mi restis entute tri horojn en kelkaj sekigejoj kaj jam ne vidis amasiĝantajn muŝojn.

Kiel ni kreis tian miraklon? La popola registaro faris multajn malfacilajn klopodojn en higiena konstruaĵo, pri kio mi nun ne skribas. Aliflanke

la popolo de Pekino disvolvis higienan amas-movadon por antaŭzorgi kontraŭ epidemio, popolanoj el ĉiu socitavolo aktive forbalaadis malpurajojn, frapadis muŝojn, kaptadis ratojn, kaj por ekstermi larvojn de moskitoj oni renversis basenojn kaj potojn kaj ŝtopis arbotruojn. Unu el la gravaj rimedoj por ekstermi muŝojn estas ekstermi la pupojn de muŝoj. De la mezo de marto ĝis la oka de junio, laŭ la nekompleta statistiko la ekstermitaj muŝoj de la tuta urbo jam atingis pli ol kvar cent milionojn. Se oni lasus ilin kreskadi kaj generadi tiam nur en kelkaj semajnoj ili atingus mirindan astronomian nombron.

Tiuj ĉi muŝpupoj estis elfositaj apud fekujoj kaj sub murbazoj de ĉiu domo. Se oni ne mobilizus la amasojn kaj se anstataŭe la registaro dungus dek mil laborantojn fari tiujn ĉi laborojn, ĉu oni povus atingi tiel grandegan sukceson?

La forto de la popolamaso estas ne komparebla. Tio estas la kerno de tiu ĉi problemo. En ĉi tiu movado, ĉiuj laborantoj de ĉiu registara institucio kaj organizo sin mobilizis fari grandegan forbalaadon. La studentoj, krom plenumi la higienan laboradon en sia lernejo, ankaŭ partoprenis tian laboron ekster lernejo. La laboristoj de fekaĵ-sekigejo ĉe Lungvang-templo diris al mi ke ĉiudimane multaj studentoj iras tien por elfosi pupon kaj mortfrapi muŝojn. Precipe la laboristaro kaj loĝantaro estas la ĉefa forto de tiu ĉi movado. Ilia aktiveco en tiu ĉi movado superis ĉiujn aliajn. Ĝis nun disvolviĝis konkurso kaj reciproka inspekto inter stratoj kaj inter profesioj. Se ĉe iu familio ankoraŭ ekzistas neuzataj basenoj malkovrite metitaj en la korto, tiam tiu ĉi familio kaj la kvartalo al kiu ĝi apartenas estos tre malgloraj. Ĉar se basenojn kaj potojn oni lasas malkovritaj, tre facile kreskiĝas moskitoj en la senmova akvo. En stratetoj oni ankaŭ povas kelkfoje renkonti homojn kunportantajn ratojn. Ili estas irantaj al la higiena grupestro. La kaptado de ratoj ankaŭ estas parto de la konkurso. De la mezo de aprilo ĝis la oka de junio jam kaptis pli ol kvar cent kvindek mil ratoj en la tuta urbo. En tiuj ĉi tri jaroj la politika konscio kaj organizpovo de la popolamaso multe plialtiĝis. En ĉiuj tiuj ĉi laboroj la popolanoj utiligis sian tutan scion kaj kreis diversajn metodojn. Ĉiuj efikaj metodoj rapide disvolviĝis tra la tuta urbo per kunvenoj, kunvenetoj, ekspozicioj, rapidjurnaloj, kaj murjurnaloj.

La plej evidenta rezulto estas la malmultiĝo de malsanoj. Tiun ĉi jaron la malsanuloj kun stomaka kaj intesta malsanoj jam ege malmultiĝis kompare kun la pasinta jaro. Ekzemple, de januaro ĝis aprilo la mortintoj de tifo estas nur 58 procentoj, mortintoj de disenterio nur 28 procentoj, la mortintoj de aliaj stomakaj kaj intestaj malsanoj nur 64 procentoj, kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro.

Sub la gvidado de la popola registaro la popolamaso mem kreis miraklon. La higiena movado antaŭzorgi kontraŭ epidemioj plue pruvis la superecon de la sistemo de nova demokratio.

Tiun ĉi someron, la popolamaso de Pekino kreis miraklon.

Zang esperantigis

La Ĉiela Altaro

Lin Huej-in

La Ĉiela Altaro troviĝas oriente de la mezlinio de la ekstera urbo de Pekino. La tuta tereno estas vasta preskaŭ kvarmil muojn kaj ĉirkaŭata de ruĝaj muroj en du perimetroj. Interne en la muroj staras densaj, altaj kaj miljaraj cipresoj kiuj formas, rigardate de malproksime, malhele verdan ombregon. La bluega kaj ombrelforma tegmento de glazuritaj tegoloj, kiu alte staras el la arbaro, estas la supro de rondforma templo kun trietaĝaj tegmentrandoj, kaj sur la supro brilas la orumita globo. Ĝi estas la mondfama Ĉi Nian Tian (preĝejo de Riĉrikolto) de la Ĉiela Altaro, speciala konstruaĵo de Ĉinio. Kiam la vagonaroj, venantaj de la sudo, eniras la urbon de Pekino, la pasaĝeroj povas vidi tiun ĉi pejzaĝon el la vagonaj fenestroj. Por multaj homoj ĝi estas la unua impresio pri la kulturaĵoj kaj konstruaĵoj de Pekino.

En pasinteco, la Ĉiela Altaro estis loko kie ĉiujare la imperiestro kultis al la ĉielo kaj preĝis por riĉrikolta jaro, kaj sekve produktajo de superstiĉo kaj feŭda, obskurantisma politiko, kaj tamen ĝi ankaŭ estas speciala, bela konstruaĵo kreita de la diligentaj laborantaj popolanoj per ŝvito, sangoj kaj saĝeco, kaj hodiaŭ havas senkomparan valoron artan kaj historian.

La tuta konstruaĵo de la Ĉiela Altaro estas dividita en du simplajn kompletojn, lokita en ebena vasta ĉirkaŭaĵo kaj ĉirkaŭata per densaj arbaroj ĉe la perimetro. En la suda kompleto, la ĉefa konstruaĵo estas granda altaro por kulto al la ĉielo nomata Huan Ĉiu (Ronda Altaro) kaj negranda rondforma templo nomata Huang Ĉiung Ju (Domo de la Ĉiela Firmamento). En la norda kompleto estas la Preĝejo de Riĉrikolto, kaj post ĝi, la Huang Ĉian Tian (Templo de Ĉielo), la orienta kaj okcidenta flankaj temploj kaj antaŭ tiuj la Pordego de Riĉrikolta Preĝo. Tiuj ĉi du kompletoj interligiĝas per blanka granita vojo kaj inter ili la distanco estas proksimume 600 metrojn longa. Krome, la grava akcesora konstruaĵo estas la Ĝaj Kung (Palaco de Fasto), fronte al la oriento. Ekstere, la du ĉirkaŭaj muroj estas kvadrataj en la suda duono, kaj duonrondaj en la norda duono. Ĝi estis konstruita laŭ la antikva teorio de ronda ĉielo kaj kvadrata tero.

La Ronda Altaro estas granda altaro por preĝi al la ĉielo, ebena, ronda, konstruita tute el blanka granito kaj aranĝita en tri etaĝoj, kaj 16 ĉi-ojn (1 ĉi-o=triono de metro) alta. La diametro de la plej supra etaĝo estas 90 ĉi-ojn longa, tiu de la dua etaĝo, 150 ĉi-ojn longa kaj de la baza, 210 ĉi-ojn longa. Ĉiu etaĝo estas randigita per blanka granita balustrado. Ĉirkaŭ la tri etaĝoj sume estas 360 balustradaj ŝtontabuloj kiuj sim-

bolos la 360 gradojn de la ĉiela cirklo. Ĉirkaŭ ĉiu etaĝo estas kvar supreniraj vojoj kun 9 ŝtupoj. La mezuro de la tuta strukturo de tiu ĉi altaro estis en la "ĉielaj nombroj" unu, tri, kvin, sep, naŭ aŭ tiuj de iliaj obloj, kio estis la plej tipa kombino de feŭdismo kaj superstiĉo. Sed en tiel severa kondiĉo la saĝaj laborantaj popolanoj tamen kreis elstaran artaĵon en arkitekturo. Tiu ĉi ronda altaro, blanka kiel neĝo en tri etaĝoj, estas ĉirkaŭata per blanka granita balustrado rafinita kiel punto, kaj kun tiel bela formo ĝi ĉiam estas altvalora konstruaĵo staranta sur la patria teritorio.

Norden de la Ĉiela Altaro, ekster Ling Ŝing Men estas la Domo de Ĉiela Firmamento. Tiun ĉi templeton oni uzis por enteni la sanktan tabuleton de la Ĉielo (dum la ceremonio kulto al la Ĉielo ĝi estis 'sankte' translokita al la altaro por akcepti la kulton

kaj poste resendita en la templeton). La plej mirinda estas la muro ĉirkaŭ ĝi, en formo de cirklo, havanta nur unu pordon sude. La surfaco de la muro estas masonita per poluritaj brikoj en geometra precizeco. Tial kiam kontraŭ iu ajn loko de la muro oni mallaŭte parolas, alia homo povas tute klare aŭdi kun orelo kontraŭ iu ajn alia loko de la muro. La vizitantoj tre ŝatas ĉi tie sin amuzi per tia 'ludo de akustiko'.



Preĝejo de Riĉrikolto en la Ĉiela Altaro

La Preĝejo de Riĉrikolto, kie oni preĝis por greno, estas rondforma templo kun trietaĝa tegmentrandoj de blue glazuritaj tegoloj kaj supre sur la plej supra tegmento estas orumita globo. La templo estas apogata per po 12 kolonoj en du cirkloj, interna kaj ekstera, kaj plej interne staras kvar Kolonoj de Draka Puto. Anstataŭ muroj estas latisporoj inter la eksteraj dek-du kolonoj, montrantaj delikatecon en majesteco. Tiu ĉi templo staras sur tri-etaĝa ronda teraso, kies formo iom similas al la Ronda Altaro kaj pli granda ol ĝi.

La projekto de la Ĉiela Altaro estis farita en la regtempo de Kia Ĉing de Ming-dinastio. El la nun restantaj konstruaĵoj la Ronda Altaro kaj la Templo de Ĉiela Firmamento estis konstruitaj en 1743. La Preĝejo de Riĉrikolto, kiu estis bruligita de tondrofulmo en 1889, estis rekonstruita en la sekvanta jaro 1890.

La Pordego de Riĉrikolta Preĝo kaj la Templo de Ĉielo ambaŭ estas la originaloj de 1545, la regtempo de Kia Ĉing de Ming-dinastio. Nun, la koloraj pentraĵoj de Ming-dinastio sur la traboj de la Pordego de Riĉrikolta Preĝo estas historiaj kuriozaĵoj.

Elĉinigiis Zekun

La Homoj sur Korsin-stepo

—Molasinf (Verkisto de Interna Mongolio)—

(daŭrigo)

Sangbu portis la leteron al Nutuk spite la pluvegon, sed li tuj revenis forgesante peti kvitancon, ĉar li avidis estingi la brulegon.

Li rapidis kaj rapidis. "Leporeto" galopis sur la kota herbejo per tuta forto. Sed ĝi ekhaltis streĉante siajn orelojn kiam ĝi preterpasis la orientan sablodunon kaj turnis sin norden, kvazaŭ iu en la fronto surprizus ĝin. Sangbu rigardis al la fronto kaj rimarkis, ke la nigra kuŝas sur la tero ne malproksime antaŭ li. Kun scivolemo li desaltis de la ĉevalo kaj iris kelke da paŝoj por rigardi pli klare. Tio estis flava ŝelto, kiu estis tramalsekigita de la pluvo kaj fariĝis terkolora. Kiam li levis la felton kaj faris nur du paŝojn, jen li denove vidis ion antaŭ si, en la formo de nigra terbulo. Li prilumis ĝin per la elektra torĉo kaj trovis ke ĝi estas nova tabak-saketo, rozkolora, sur kies longaj rubandoj el verda atlaso brodiĝas konvolvuloj serpentinumaj. Li ridis senkomprene: "Kiu ja perdis ĝin dum la ambabilado? Nu, mi ne zorgas, kiu bela knabino kudris ĝin, sed ĝi estas nun al mia dispono. Tamen mia Saĝen certe brodas miloble pli bone." Sed li ekmemoris, ke nun pli urĝas la brulestinga laboro. Volvinte la felton kune kun la tabaka saketo kaj liginte ilin sur la selon, li tuj foriris.

Kiam li proksimiĝis al la tumulto de la brulestingistaro, li vidis, ke la fajro estos baldaŭ estingita; restas nur malmultaj amasetoj de fajro sur la forbruligita zono, kiujn oni estas subpremantaj. Li spiris de plifaciliĝo: "Ha! nun ĉio estos baldaŭ en ordo." Sed ĝuste en tiu momento sur tiu parto de la fajrozono ĉe la suda flanko kiu ne altiris la atenton, la fajro rampis orienten ŝtele. Ha, danĝere! Ĉe la oriento estis la plej vasta herbejo de tuta Nutuk, kie amasiĝis montsimile la ŝafa furaĝo. Se la fajro tien atingus, per kio la brutaro de tuta Nutuk vivus dum la vintro! Li tuj desaltis de la ĉevalo kaj volis voki la aliajn iri kune kun li, sed sub la muĝado de furioza flamo, lia voĉo ne estis aŭdebla por ili. Li povis nur malligi la malsekan felton de sur la selo, metis la tabaksaketon en sian sinon kaj kuris al la fajro, kiu rampis orienten.

"Leporeto" iris iom pli malproksime de la fajrozono kaj atendis sian mastron.

Sangbu estis ja bravulo, sed kion li pensus kiam li ĵetis sin sur la fajrozono? Ĉu li estis frenezulo, kiu saltis en la fajron por sinmortigi? Ne, tute ne. Li estis mense normala kaj saĝa homo; sed kiel dudekdujara junul-ligano, kion li povus pensi? Kiam la furioza fajro pafiĝis al la vasta herbejo kiel venena serpento kaj la nubskrapa furaĝamaso estis baldaŭ forbruligota, kion li intencis fari? Li saltis en la fajrozono spite ĉiajn danĝerojn.

La malseka pelto estas la plej efika brulestingilo. Svingante ĝin dekstren kaj maldekstren, li subpremis la fajron. Sed estis malfacile moviĝi en la furioza fajro: la densa fumo sufokis kaj la varmego bakis la korpon dolore, sed li ne atentis pri ĉio ĉi. "Se mi nur povus estingi la brulegon, mi mortus kontente en la fajro," tiel pensis li.

Li laciĝis, lia menso jen nebuliĝis jen sereniĝis en la densa fumo, sed subite malheliĝis antaŭ liaj okuloj, li ŝanceliĝis kelkfoje kaj fine falis teren. La fajro brulis daŭre apud li.

Amogulang kuris tien reen, kuraĝigis la amason de tempo al tempo kaj superrigardis la laboron de la grupetoj; ĉio tio laciĝis lin tiel, kvazaŭ ĉiuj liaj harradikoj vomus fajron. La stepa brulego estis fine estingita sub la batalado de la amaso kaj verŝado de ia pluvego.

"Hej, atentu, kial restas ankoraŭ fajroamaso ĉe la orienta flanko?" kriis maljuna Beiĵe.

"Kiel bruliĝas denove ĉe la orienta flanko?"

Amogulang rigardis al la oriento kaj tie efektive troviĝis fajro. Li kuris tien spiregante kaj vidis neklare, ke nigra ombro falis en la fajro. Li tuj turnis sin por voki: "Ĉiuj venu rapide!" Sed la aliaj jam longe sekvis lin post la dorso. Li diris balbute: "Iu falis en la fajro, elsavu lin rapide!"

La amaso alrapidis kun maljuna Beiĵe ĉe la kapo. Li kuris en la fajro kun fermitaj okuloj kaj retenita spirado, levis la homon kaj rekuris eksteren, la aliaj helpis porti tiun for de la fajrozono. Ili rigardis atente.

"Ho! Estas Sangbu!" Beiĵe stultiĝis.

Li sciis ke lia filino estas en amo kun Sangbu kaj ankaŭ li mem jam delonge amis lin, sed li ne komprenis, kiel Sangbu iris tien kaj falis en la fajro.

Amogulang gvidis parton de la amaso estingi ankaŭ tiun fajron.

"Sangbu! Sangbu!" kriis Amogulang plurfoje ĉe la orelo de la junulo, sed tiu lasta ne respondis en la senkonscieco.

"Ni tuj portu lin hejmen!" diris iu juna homo.

"Ne, ne gravas, li estas nur sufokita de la fumo kaj baldaŭ vekiĝos, kiam li enspiros iom da freŝa aero," respondis Amogulang.

Efektive Sangbu vekiĝis post nelonge, li sentis nur iom da kapturiniĝo kaj senforteco; li ne emis paroli kaj tial ne respondis la zorgemajn demandojn de Beiĵe.

"Li jam vekiĝis," diris Amogulang al la amaso, "kaj la fajro estas complete estingita, ni hejmen iru, ĉar la pluvo ĉiam pli fortiĝas. Sed la milicestro starigu ĉi tie kelkajn sentinelojn por malhelpi la reviviĝon de la estingita fajro. Tiel do."

En la peĉe nigra nokto, sur la senlima stepo, kvankam la brulego estis estingita sed la trezoro de la stepo, granda junkmarĉo fariĝis nuda tero post la fajro. Ĉiu el la homoj estis lacega, malĝoja kaj hejmeniris silente kun klinita kapo.

Sur la vojo hejmen Sangbu tute rekonsciiĝis. Li rakontis al Amogulang kaj Beiĵe de l' komenco ĝis la fino, kiel li trovis survoje la felton kaj la tabakujon, kiam li revenis de la leterportado kaj kiel li subpremis la fajron poste.

"Vi diris, ke vi trovis ankaŭ tabaksaketon krom la felto?"

“Rigardu, jen ĝi estas,” Sangbu elprenis la tabak-saketon el la sino kaj montris ĝin al Amogulang.

“Aha! tre interese,” Amogulang transprenis ĝin kaj traserĉis parolante. “Kial troviĝas ankoraŭ paperfolio en ĝi? Ho, estas ja letero!”

“Kies letero? kaj kio estas skribita?” Sangbu kaj Beiĵe demandis unuvoĉe.

Finleginte la leteron, Amogulang stultiĝis.

“Strange, kiel strange! Pri kio estas la afero? Felto, letero kaj en tia malluma pluva nokto. Strange, vere strange!” Amogulang meditis.

“Tamen pri kio estas la afero?”

“Rigardu, kies estas tiu letero?” li donis ĝin al Sangbu.

“Kio! . . . Tio estas skribita de Sajen al mi. . . ?”

“Kiel estas Sajenkova? Kiel fariĝis mia infano?” kriis Beiĵe.

“Ĉu via filino pelis la bovaron hejmen hodiaŭ vespere?” demandis Amogulang.

“Mi ne vidis ŝin reveni. Eble ŝi iris estingi la fajron kun la amaso, kiel aktiva elemento inter la virinoj, ĉu ŝi povus postresti!”

“Tamen hejmen iru por rigardi, ĉu ŝi jam revenis.”

“Kio ja okazis! Bone, mi iras, mi iras rigardi,” maljuna Beiĵe foriris parolante.

Fraĵo Sangbu:

Tiun ĉi tabakujon mi faris malbele, sed por ĝin kudri mi pikis al mi la fingrojn. Do prenu ĝin en vian servon!

Sajen.

La 21an de aŭgusto.

Kiam Sangbu finlegis la leteron, li malfermegis la okulojn kaj trovis sin en vere enigma situacio.

“Ĉu vi trovas tion stranga?” demandis Amogulang.

“Stranga! terure stranga!”

“Mi trovas, ke la strangaĵo ne estas tiu letero, sed estas tio, ke ĝi malkovriĝis kune kun la mistera felto.

“Jen perpleksiga enigmo.” Sangbu estis tiel maltrankvila, ke ŝvito fluis malsupren de la frunto.

“Estu trankvila, infano! Ĉio fariĝos klara, kiam Beiĵe revenos.”

Klakis la pordo de la ekstera ĉambro kaj enpaŝis Beiĵe, sekvata de amaso. Ĉar, kiam li ne trovis Sajenkova-n en la hejmo, li ankaŭ vizitis kelkajn najbarojn survoje por informiĝi, tiel ĉiuj tiuj ne povis plu dormi kviete kaj sekvis lin tien.

“Ŝi ne revenis de post sia foriro en la mateno, mi serĉis ŝin tra la vilaĝo sed neniue scias kie ŝi estas,” Beiĵe diris al Amogulang.

“Ne, kiam la suno estis subiranta, mi revenis de Nutuk kaj vidis ŝin staranta sur la orienta sabloduno, mi opinias, ke ŝi estis atendanta Sangbu-n.”

“Mi konsentis rendevui kun ŝi hodiaŭ, sed kiam mi iris al la orienta sabloduno, mi ne trovis ŝin.”

“Do kiel ŝi povas ne reveni senkaŭze? Ĉu vi parolis al ŝi pri io alia, Sangbu? Kial ŝi ne revenas ĝuste hodiaŭ?”

Kvankam Beiĵe fidis al Sangbu, sed kiam li estis maltrankvila, li parolis tre severe. Ja estis la unua fojo, ke li tiel traktis Sangbu-n.

La arda koro de Sangbu kvazaŭ estis superverŝata per pelvo da malvarma akvo. Li ne povis eligi eĉ unu vorton, longe stultiĝante vizaĝe al la lampa fajro, li subite klinis sian kapon sur la terliton kaj ekploris.

Post ioma pripenso, Amogulang levis la flavan felton kaj parolis al la amaso:

“Pri tiu afero mi havas mian apartan opinion: rigardu, tio estas felto, flava felto. La cirkulero de la Standarda Buroo de Publika Sekureco, kiun mi antaŭ nelonge legis al la amaskunveno, diris ke Paŭlu, la rifuĝanta krimulo, portas ĉe si flavan felton. Tial ni devas pli pripensi. Krom tio, mirige estas, ke ĝuste hodiaŭ vespere estiĝis stepa brulego. Ne konsiderante tiujn detalojn kaj nur kverelante inter si oni ne eltrovos la trafan solvon.

Aŭdinte tion, maljuna Beiĵe levis la kapon honteme, ĉirkaŭrigardis la amason kaj murmuris:

“Inter ni rondiras proverbo: blindulo ne elrampos Korsin-stepon dum sia tuta vivo. Tia maljuna malsaĝulo, kia mi, estas ĉiam tiel miopa en la aferoj malgraŭ mia blanka hararo. Amogulang parolis prave; oni ne povas kulpigi Sangbu-n pri la malapero de Sajenkova, mi scias, ke li elkore amas ŝin.” Tiam li turnis sin al Sangbu: “Ĉu vi kulpigas min, infano?”

Sangbu leviĝis malrapide:

“Ne, neniun mi kulpigas. Mi nur maltrankviliĝas, kiel mi povus baldaŭ retrovi Sajen. Vi devas kompreni: ŝia malapero igas min nekapabla resti trankvila eĉ duon-sekundo.”

Dumtempe la milicestro kaj la komitatano de publika sekureco alkuris ŝvitokovritaj, aŭdinte, ke Sajenkova malaperis.

“Bone, vi alvenas ĝustatempe, mi ĵus volis sendi iun por vin venigi,” diris Amogulang.

Amogulang analizis la cirkonstancon kun la milicestro, la komitatano de publika sekureco, Sangbu kaj Beiĵe, kaj decidis fine: dividi la milicon de la tuta vilaĝo en bandetojn, ke ili traserĉu la najbarojn ĉiuj aparte kaj eltrovu Sajenkova-n. Li sendis ankaŭ skriban raporton pri ĉio ĉi al Nutuk.

Amogulang kaj Sangbu kune kun aliaj tri milicanoj formis bandeton kaj ekiris traserĉi norden.

* * *

Sajenkova daŭrigis la postĉason de la kontraŭrevoluciulo.

Ekpluvo eligis sur la herbejo bruon similan al lupa blekado. La tondro kaj la fulmo impresis kvazaŭ la tuta mondo renversiĝus. Antaŭ ŝiaj okuloj disvastiĝis nigra malplena ebenaĵo. Ŝi orientis sin nur per la multjara sperto de paŝtado sur tiu stepo. Sed estis malfacile eĉ fari unu paŝon sur la stepo dum la pluvsezono. Ĉie estis kotkaĉo. Iam la granda ruĝa ĉevalo faris falsan paŝon kaj falis kune kun Sajenkova en la kotakvon. Sed ŝi ne estis timigita, releviĝis kaj daŭrigis la postkuron.

Ŝia brulvundo tuŝata de akvo doloriĝis ŝin ĝisoste kaj turmentis ŝin tiel, ke mankis al ŝi eĉ la forto larĝe malfermi la okulojn. “Kie mi povus atingi lin sur tiu ĉi senlima stepo!” pensis ŝi. Sed en la fulmado ŝi ek-malkovris ies piedsignojn en la koto, kiu redonis al ŝi kuraĝon kaj ŝi daŭrigis plu la postĉason. “Okcidente

estas Silamulun-rivero, kiu alte leviĝas pro la pluvego, kaj li certe ne iros tien. Do restas nur la nordo," tiel ŝi kalkulis.

Ŝi vidis nebulece monteton antaŭ si. Tiu monteto estis nomata Hadenauĵu. Sur la monteto staris kelke da junaj ulmoj. Krom tio, ke Sajenkova ofte pelis sian bovaron tien por iom amuzi sin, estis sur tiu monteto, ke Sangbu unuafoje petis ŝian manon. Sur ĝi diversaj floroj kreskis. Ŝi memoris, ke foje en tiu sama loko Sangbu ornamis ŝian kaptukon per du belaj floroj... Tiam la sorĉaj lipoj kaj feliĉa rideto de Sangbu denove viziis en ŝia cerbo, kaj dummomente ŝi estis tute okupata de la memoro de florsimila amo.

Ŭang, ĉang, ŭang... Ekaŭdiĝis de la monteto kelkaj mallongaj hundbojoj, kaj ŝia koro bategis; eĉ ŝi mem ne sciis, ĉu pro ĝojo, ĉu pro timo.

"Estas certe, ke la fripono estas malkovrita de Glu," pensis ŝi. Kiam ŝi suriris la monteton, ŝi igis la ĉevalon iri kiel eble plej malrapide kaj mallaŭte; ŝi malfermegis la okulojn kaj serĉis ĉirkaŭ si. Ŝi esperis, ke la malgranda Glu donos al ŝi plian indikon, sed ĝi ne faris kion ŝi esperis.

"Hej! nun boju, malbenita hundo!" De la deklivo kelkajn metrojn for de ŝi aŭdiĝis triumfa kaj fiera baso de viro. Rigardante atente kun vidstreĉo, Sajenkova vidis, ke iu ombro iras supren kaj post ĝi io nigra falas sur la teron. "Eble la fripono mortigis Glu-n!" Je tiu penso forto eknaskiĝis en ŝi, kaj ekpremante la piedingojn ŝi proksimiĝis al la ombro kaj celis al ĝi ekpafon. La ombro forkuris kiel ciklono. Ŝi pensis: "La fripono ne havas pafilon kaj ne necesas lin mortigi. Estas preferinde kapti lin viva!" Ŝi postkuris kaj batis forte per la pafilo. La ombro eligis vekrion kaj falis sur la teron. Sajenkova metis sian fingron sur la ĉano kaj kriis: "Ne moviĝu!" (Ŝi memoris, ke la batalantoj tiel kriis.) La ombro ne eligis unu vorton kaj kuŝis senmove. "Eble li svenis," pensis ŝi. Ŝi desaltis de la ĉevalo kaj volis lin ĉirkaŭligi. Sed aŭdiĝis, ke pafilo klakas post ŝia dorso kaj iu krias tuj poste:

"Ne moviĝu! aŭ mi pafos!"

Sajenkova tremis tra la tuta korpo kaj meditis:

"Ĉio finita! Mi estas embuskita, ĉirkaŭsieĝata! Sed mi montrus min vera mongolo, malcedulo!"

"Kiu vi estas? Mi ankaŭ pafos, se vi pli proksimiĝus!" Ŝi kriegis ĝis-raŭke.

"Ho! Ĉu vi estas Sajen?" Estis bone konata kaj intimega tenoro. Kaj tuj sekve blindiga lumo de elektra torĉo falis sur ŝian kotkovritan korpon.

"Estas vi efektive, Sajenkova, kara infano!" diris Amogulang desaltante de la ĉevalo kaj post lia dorso troviĝis ankoraŭ kelkaj aliaj.

"Avo Amogulang! Sangbu!" Sajenkova unuafoje trovis tiujn du nomojn pli karaj kaj respektindaj ol ordinare. Kun okuloj plenaj de larmoj ŝi ĵetis sin sur Amogulang kaj ĉirkaŭprenis lin forte.

"Lasu tion unue, kara infano! Mi demandas: ĉu estas vi, kiu pafis antaŭ nelonge?"

"Jes mi. Mi elŝiris la pafilon de la fripono kaj faligis lin per ĝi."

Sajenkova ankaŭ ĉirkaŭprenis Sangbu-n, transprenis lian elektran torĉon kaj prilumis la ĵus faligitan ombbron. Ĉiuj rigardis en tiu direkto laŭ la elektra lumo. Jen variolulo levis sin kaj intencis forkuri.

"Haltu, abomenindulo! Ĉu vi intencas forkuri ankoraŭ?"

La fripono haltis timigite. Amogulang iris antaŭen per grandaj paŝoj kaj demandis:

"Kiu vi estas? Kia estas via profesio?"

"Mi estas mi mem, ordinara popolano." La fripono malkovris sian oran falsan denton en la fronto kiam li ekparolis.

"Ho, mi konas vin, vi estas 'vic-batalionestro' Paŭlu el Alukersin-standardo."

"Vi parolas sensencaĵon! Mi estas loĝanto de Korsin-standardo!"

"Ĉu vi kredas, ke via ruza argumento savos vin de la kondamnado de la popoloj? Vi eraras."

"Estas tiu ĉi fripono, kiu bruligis la nordan junkmarĉon," diris Sajenkova indignante.

La fripono movetis siajn palpebrojn sed diris nenion.

"Ni ne konduku kritiko-kunvenon por la kontraŭ-revoluciulo. Jam lin ĉirkaŭligu kaj forkonduku!" Amogulang diris al la milicanoj.

"'Sinjoro' Paŭlu, vi jam ne bone ripozis dumlonge, ekiru, bonvolu iri al la Nigradomo Hotelo (t.e. malliberejo) por havi iom da ripozo!" Sangbu diris ironie dum la ĉirkaŭligado.

Sajenkova vidis, ke la malamiko estas ĉirkaŭligata en ŝia ĉeesto, ŝi sentis neeldireblan ĝojon. Sangbu alpaŝis kaj premis ŝian manon dirante: "Sajen, vi multe lacas!"

"Ne, tio estas mia devo."

Ambaŭ ili ekridis.

"Sajenkova parolis prave: tio estas la devo de ĉiu stepano."

"Avo Amogulang, mia malgranda Glu... Ĝi ĉiam iras antaŭ aŭ malantaŭ mia ĉevalo jam tri-kvar jarojn kaj mordmortigis tri lupojn, kiuj atakis la bovaron, sed hodiaŭ..." Ŝi sufokiĝis de singultado.

Amogulang karesis ŝian hararon kaj diris:

"Mi kunsentas kun vi, infano. Viaj haroj estas bruldifektitaj, via vizaĝo ŝvelas pro la brulo kaj via malgranda Glu estas mortigita de la kontraŭ-revoluciulo. Sed mi ne trovas tion bedaŭrinda. Komprenu: tiu fripono, kiun vi kaptis, estas Paŭlu, la kontraŭ-revoluciulo, plej multe malamata de la popoloj de Zalud-standardo, Korsin-standardo kaj ankaŭ de la tuta Interneta Mongolio. Tial vi ne nur ekstermis lupon por la stepo sed ankaŭ gajnis por ĝi gloron!" Li daŭrigis post paŭzeto: "Mi volas vin sciigi, ke ankaŭ via Sangbu faris ion eksterordinaran por la stepo: dum la brulestingado, li saltis en la fajron por ĝin estingi, fine sufokiĝis de la fumo kaj svenis tie. Mi kuraĝas diri, ke vi estas la veraj mongoloj de la Maŭ-Ze-tunga epoko. En la pasinteco la Ĉiang-Kaj-ŝeka banditaro diris, ke ni mongoloj estas barbaroj nutritaj de bova fekaĵo kaj ĉevala urino, sed hodiaŭ sub la gvidado kaj edukado de Prezidanto Maŭ kaj la Ĉina Komunista Partio, tiuj "barbaroj" fariĝas novaj homoj progresemaĵ kaj ŝtalvolaj, ni ne nur sciopovas konstrui la belan Internan Mongolion, la limlondon de la patrio, sed sciopovas ankaŭ kiel ĝin defendi. Post la subpremo al la kontraŭ-revoluciuloj, ili ne plu povas resti en la urboj kaj kredas, ke ili povas kaŝi sin kelkajn jarojn sur la stepo kun du ŝen-oj (2 litroj) da bakita rizo. Ili kalkulas erare! La stepo ne plu restas la malnova stepo kiel ili imagas. Sur tiu stepo ĉie troviĝas kaptiloj pretigitaj por ili!"

Paŭlu silentis kun klinita kapo antaŭ Amogulang.

La nigraj nuboj, kiuj kovris la tutan ĉielon, flugis al la sudo unu post alia kaj je la orienta flanko de la stepo matena lumo aperis ĉe la ĉiela rando. Floroj sur la tero levis siajn kapojn kun rideto kaj sovaĝaj anseroj kantis en la aero.

La suno leviĝis.

Elĉinigi S. J.

La Reakcia Japana Registaro Ne Povas Mutigi la Pacdeziron de la Popolo

Karaj pacamantoj kolektiĝantaj ĉe la Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj!

Al vi ĉiuj ni sendas elkoran saluton! Nuntempe la problemo de la paco estas super ĉiuj aliaj. Kaj atingi pacon per la interkonsilado kaj interkomprenado estas pli dezirinde ol per la tiel nomata milito por paco. Jen malfermiĝas la Konferenco por paco en Pekino. Tio ja estas ege signifplena. Ni kredas, ke certe ĝi alportos gloran rikolton ne nur por popoloj en Azia kaj Pacifika Regionoj sed ankaŭ por la popoloj en la tuta mondo. Do, ni tutkore deziregas brilan sukceson de la Konferenco.

Ankaŭ en nia Japanio multaj pacamantoj deziras partopreni la Konferencon, sed la reakcia Joŝida Registaro malpermesas la vojaĝon al Ĉinio. Pacamantoj forte protestas tion. Tamen, la senhonta Joŝida Registaro ne ŝanĝos la sintenadon. Do, eble la reprezentantoj de japana popolo ne povos partopreni oficiale. Estas granda bedaŭro! Sed, eĉ se la registaro malpermesus la partoprenon, ili ne povas mutigi la pacdeziron de l' popolo.

Ni ja laŭte kuraĝe diras: "Ni japana popolo elkore deziras pacon kaj amikajn interrilatojn kun ĉiuj popoloj en Azia kaj Pacifika kaj la aliaj regionoj." Por realigi tion, ni energie klopodas.

Karaj amikoj! karaj fratoj! kunlaboru por la mondpaco!

Kun amikecplena manpremo viaj amikoj en la grupo ANTAŬEN" reprezentante subskribas G. L. M.

Aŭskultu la Voĉon de Patrino!

Karaj gesamideanoj,

La Paco-movado en nia lando pliiĝas ĉiutage kaj pli kaj pli da homoj konstatas kiel la militpreparadoj malplibonigas nian vivsituation. La vivkosto plialtiĝas ĉiutage, kaj ĝi daŭre plialtiĝos ĝis la frenezaj militpreparadoj estos haltigitaj. Ni patrinoj naskas niajn filojn por pli bona celo ol mortigi la filojn de la patrinoj de aliaj landoj kaj kiam mi rigardas miajn filojn (mia infaneto Alan aĝos unu jaron post kvin tagoj) mi koleriĝas pensi pri la militceloj de malbonega kapitalismo. Tamen ili neniam povos detruiri la volon de la homoj de la mondo vivi en paco kaj amikeco. Pro tiu kialo

mi legas kun ĝojo pri la atingoj en via lando. Mi forte deziras sukceson al la Popola Ĉinio kaj mi atendas deziregante legi pli pri la vivo en via lando.

Sincerajn Bondezirojn de mi, mia edzo kaj miaj filoj!

via

Jeanne Dick, Skotlando

Franca Popolo Venkos

Karegaj kamaradoj,

.....Nia malfeliĉa lando konas veran invadon de usonaj soldatoj. Nur en mia regiono ili nombras pli ol 40,000 t.e. pli multe ol la germanoj dum lasta okupado. Ĉu vi scias kion ili faras? Ili manovras pri reenŝipado ĉe marbordo apud La Roŝelo, kio montras klare ke se ili forfuĝos



antaŭ la "malamikoj"—kiel ili kutimas cetere—ili detruos ĉion kaj reformiros al Usono.

Por konstrui vastegan vojon de Bordo ĝis Germanio, la usonanoj volas preni multajn kampojn de niaj kamparanoj, sed tiuj ĉi luktos firme.

Feliĉe ke la franca popolo scias perfekte ke ili venkos kiel sovetianoj, ĉinoj, ĉekoslovakoj ktp. Jes, nia venko proksimiĝas, ĉar nia lamanta registaro ne povas malhelpi plialtiĝon de prezoj nek gravegan faĵon de nia mono.Ni legas abunde pri viaj laboradoj, viaj sukcesoj, viaj paroladoj kaj viaj kunvenoj kun Sovetio. Vere vi estas sur bonega vojo kaj ni envias vin.

Vivu Maŭ Ze-tung!

Vivu eterne Ĉinio!

Vivu paco!

Fratan saluton el via franca k-do
Robert Farail

Hungara Popolo Kunligiĝas en la Pacbatalo kun Aziaj Popoloj

Al la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

La laborantoj de la Hungara Nacia Banko sendas siajn fratajn batal-salutojn al la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj kaj deziras venkan sukceson al ĝia laboro.

Ni hungaraj laborantoj mem ankaŭ entuziasme partoprenas kun gvidado de la granda Sovetunio en la batalado de la pactendaro kaj faras ĉion por fortigi la pacbatalon de la progresemaj popoloj de la mondo.

Nia land-konstruado, nia socialista laborkonkurso kaj la fortigo de nia patrujdefendo ĉio servas tiun celon, ke anakŭ ni partoprenu en la defendo de la paco de la mondo.

De jaroj ni turnas nin kun amika amo al la por liberiga batalo luktantaj kaj novan landon konstru-antaj Aziaj nacioj kaj ni ripete etendis nian amikan manon al la multon suferanta korea heroo popolo kaj ni ĉiuj partoprenis en la landa kolektado por helpi la korean popolon. Ankaŭ per tio laŭ niaj povoj ni sendis medikamentojn, ambulanc-vagonaron, vestaĵojn, kaj de jaroj la hungaraj kuracistoj sanigas la koreajn batalantojn. La laborantinoj de nia banko pretigis kun multa amo tiujn kovrilojn, kiuj ŝirmas la koreajn infanojn kontraŭ la malvarmo kaj ankaŭ per tio ni esprimis nian fratan kunsenton.

Kun ĉio ĉi ni deziris atesti, ke ni ne nur per vortoj, sed ankaŭ per agoj partoprenas en la pacbatalo de la Aziaj popoloj kaj tiel ni kune volas defendi kaj konservi la pacon de la laborantoj de la mondo kaj kune kun ili ni volas rebati ĉiun atakon de la militpretigantoj kaj konstrui la feliĉan patrujon de la liberaj popoloj.

Vivu la Packonferenco de la Aziaj kaj Pacifikaj Popoloj!

Vivu la pacvolo, pacbatalo kaj liberiga lukto de la popoloj!

Vivu la per gvidado de la Sovetunio de venko al venko antaŭen-iranta pactendaro!

La Packomitato
de la Hungara
Nacia Banko

Grava Sciigo

Nia administracio jam translokigis al 38, Suchow Hutung, Peking, Ĉinio. Niaj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nun vole skribi rekte al la nova adreso por ke ĝi povu vin respondi ĝust-tempe. Ankaŭ la pagon de la abonkotizoj ĉu de individuaj legantoj, ĉu de la landaj perantoj, ĉu per mono, ĉu per respondkuponoj, aŭ aliaj eldonaĵoj, oni devas tien sendi.

Sed pri opinioj pri nia bulteno, utiligoj de materialoj publikigitaj sur nia bulteno aŭ aliaj demandoj senrilataj kun la administrado ni petas la legantojn kaj kunlaborantojn daŭre skribi al nia redakcio laŭ la malnova adreso.

El Popola Ĉinio

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

Administracio: 38, Suchow Hutung, Peking, Ĉinio.

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo—Miloj da packolomboj ŝvebas sur la kapoj de la paradantoj en la Nacia Festo de Ĉina Popola Respubliko, 1, okt. 1952.

La Ĉina Popola Respubliko—Fortikaĵo de Paco en Azia kaj Pacifika Regionoj.

Estingu la Militfajron kaj Savu la Pacon.

Grandaj Ekonomiaj Venkoj de Nova Ĉinio.

Niaj Grenoj Kreskas Fortaj Ankaŭ sub la Bombardo.

Usona "Humanismo" Malkovrita. Mia Impreso pri Nova Ĉinio.

La Miraklo de Tiu ĉi Somero en Pekino.

La Homoj sur Korsin-stepo.

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** (1) **Steve Bennett**, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
(2) (por abono:) **A. Keesing**, G. P. O. Box 4886, Sydney.
(3) (por aĉeto:) **Current Book Distributors**, 40 Market Street, Sydney, NSW.

Aŭstrio: **Antonio Balague**, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)

Belgio: **Walraevens Rajmundo**, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

Britlando: **F-ino F. Paraige**, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)

Bulgario: (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)
(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

Ĉeĥoslovakio: **Burda Rudolf**, Plzen, palackeho N. ĉ. 6. (Jarabono 50 kĉs.)

Danlando: **Hans v. Bindner**, Poppelalle 76, Vivu Hareskovby. (Jarabono 6 kronoj)

Finnlando: **Niilo Kavenius**, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)

Francio: **Labor-Esperantista Federacio** (Jarabono: Fr. F. 450)

Germanio: (1) **Helmut Löffler**, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)

(2) **Heiny Knorr**, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.

Hungario: (1) **KULTURA**, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)

(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapest, XII, (poŝtkonto 38.187)

Indonesio: **Kho Khwat Liat**, Post Box 115, Surabaya, Java. (Jarabono: 10 Rp.)

Islando: **Siguldur Gudmundsson**, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)

Italio: **Eduardo Zumbo**, Casella postale 226. Torino. (Jarabono: 400 liroj)

Izraelio: **Bencion H. Danon**, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

Japanio: (jarabono 360 jen-oj)

Meksikio (kaj aliaj sudamerikaj landoj): **Jezevo Serrano L.**, Central de Talabarteros 72, Col. E. Carranza, Mexico, D. F. (Jarabono: 5 pesoj)

Nederlando: (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)

(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4. Vaals.

Pollando: **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszalkowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113) (Jarabono 12 zl.)

Rumanio: **Rumana Esperantista Societo**, București I. Bulev. 6 Martie 15. et. I. (Jarabono: 120 leoj)

Svedio: **Einar Adamson**, Värmlandsgatan 18. Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)

Usono: (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.